..... Ĉu vi vivas kune kun via edzo, aŭ vi vivas sen
edzo?

..... Kiam vi rigardas televidon? Ĉu nur vespere aŭ ankaŭ matene?

..... Kiam oni diras “*Bonan nokton!*” kaj kiam oni diras “*Bonan vesperon!*”?

.....
Ĉu vi diras “*Bonan matenon!*” antaŭ ekdormo aŭ post ellitiĝo?

..... Ĉu estas multaj interesaj filmoj en Koreio?

..... Kiu filmoj estas pli interesaj: la amerikaj filmoj aŭ la koreaj?

..... Ĉu la proverbo “*Bojas hundidoj, ĉar ankaŭ la hundo faras tiel.*” montras, ke la hungaroj parolas hungare kaj la koreoj koree kaj la japanoj japane? Aŭ ĉu la proverbo instruas, ke la gefiloj ĉiam faras, kion siaj gepatroj faras?

..... Multaj homoj pensas, ke kiu ne laboras tiu ankaŭ ne manĝu. Ĉu vi pensas, ke tio estas bona penso?

..... Ĉu vi pensas, ke ĉiu komenco estas malfacila?

..... Ĉu vi pensas, ke esperanto estas malfacila lingvo sed la ĉina lingvo estas facila?

..... Mi legis, ke oni povas lerni esperanton en tri cent horoj kaj oni povas lerni anglan lingvon en tri mil horoj. Kiu lingvo estas pli facila: ĉu la esperanto aŭ ĉu la angla?

Kiu besto havas pli da idoj? Ĉu bovino aŭ katino? Katino havas pli da idoj. Kiom da idoj havas kokinoj, bovinoj, ĉevalinoj, hundinoj kaj katinoj en Koreio?

.....
.....
Kies ido estas pli granda? Ĉu ido de muso aŭ ido de azeno? ...

..... Ĉu mi bone pensas, ke kokino ne havas idojn ĉar kokino havas ovojn?

..... Ĉu estas vera, ke kokidoj fariĝas el ovoj?

..... Ĉu ankaŭ la ŝafoj kaj ŝafinoj havas ovojn?

..... Ĉu la bovidoj manĝas lakton kaj ankaŭ la porkidoj?

..... Ĉu estas vera, ke ankaŭ la kokino donas lakton al siaj kokidoj kiam ili estas tre junaj? ...

..... Ĉu ŝafidoj neniam manĝas lakton?

Ĉu vivas ie homoj, kiuj manĝas porkidojn?
 Kiuj estas pli fortaj: la bovoj aŭ la
 bovinoj?
 Ĉu la bovido estas ĉiam pli forta, ol la bovino?
 Kial ne scias flugi la
 birdidoj?
 Kial ne povas rapide kuri la hundidoj?
 Kial ne povas flugi la porkoj?

 Ĉu estas vera, ke birdetoj ne povas flugi, ĉar ili havas malfortajn
 flugilojn? Ĉu vi vivas tiel,
 kiel vi volas, aŭ ĉu vi vivas tiel, kiel vi povas?
 Ĉu vi pensas, ke unu malnova
 amiko estas pli bona ol du novaj amikoj?

 Ĉu estas vera, ke nova balailo bone balaas?
 En Eŭropo multaj homoj pensas, ke tiu
 proverbo parolas ne nur pri balailoj, sed ĝi parolas ankaŭ pri
 homoj. Oni pensas, ke homo en nova laborejo volas tre bone
 labori ĉar li volas montri, ke li estas bona homo. Ĉu ankaŭ vi
 pensas tiel?
 Kien iris la hundo? Ĉu en la kuirejon? Ĉu en la ĉambron?
 Kie estas nun la
 hundo? Kiel vi
 nomiĝas kaj kie vi loĝas?

Kien flugis la birdo? Ĉu super la arbon? Ĉu super la domon? Ĝi flugis super la arbon. Kie estas nun la birdo?

..... Kien kuris la muso? Ĉu apud la ŝrankon? Ĉu malantaŭ la ŝrankon? Kie estas nun la muso?

Poste la muso iris sub la ŝrankon. Kie nun estas la muso?

..... Kial iris la muso sub la ŝrankon? Ĉar tiel la kato ne povas manĝi ĝin?

..... Ĉu la musoj scias, ke katoj ŝatas manĝi musojn? Kial estas, ke katoj povas manĝi musojn sed musoj ne povas manĝi katojn? Ĉu estas tial, ĉar la katoj estas pli fortaj ol la musoj?

..... Kiam vi havis pli da problemoj? Kiam vi estis infano, aŭ vi pensas, ke nun vi havas pli da problemoj?

..... Eŭropa proverbo diras: „*Malgranda infano: malgranda problemo. Granda infano: granda problemo.*”

Ĉu mi bone pensas, ke la eŭropaj gepatroj havas pli grandajn problemojn kiam siaj gefiloj estas pli junaj kaj ili havas pli malgrandajn problemojn kiam siaj gefiloj estas pli maljunaj?

.....
.....

Ĉu la bovidoj naskiĝas, aŭ ĉu ili fariĝas el ovoĵ?
 Kiuĵ bestoj fariĝas el ovoĵ?
 Ĉu estas vera, ke
 nur birdoj estiĝas el ovoĵ? Ĉu mi
 bone pensas, ke kiam la arbaro silentas, tiam estas silento en la
 arbaro?
 Ĉu ankaŭ tiam silentas la arbaro kiam la birdoj fajfas tie?

 Per kio fajfas la birdoj?
 Kiel vi fartas, kiam vi estas sana kaj kiel vi fartas, kiam vi estas
 malsana?
 Kiel vi fartas, kiam
 vi estas sata kaj kiel vi fartas, kiam vi estas malsata?

 Ĉu en la Esperanto lingvo oni skribas tiel, kiel oni parolas?
 Ĉu ankaŭ en la
 korea lingvo oni skribas tiel, kiel oni parolas?
 Kiel estas tio en
 la angla lingvo?
 Hieraŭ mi iris hejmen nokte, je la dekunua
 horo. Mi diris al mia edzino, ke mi devis labori multe en mia
 laborejo. Ŝi diris al mi: „*Tion povas diri kiu ajn.*” Ĉu mi bone
 pensas, ke mia edzino estis feliĉa, ĉar mi multe laboris?

Antaŭ du tagoj mi demandis mian malnovan bonan amikinson:
“Ĉu vi volas iri kun mi al restoracio en Busan manĝi pulgokion
kun kimĉio?” ŝi diris: “Mi volas, sed mi ne povas ĉar mi devas
multe labori en mia laborejo. Tial mi ne havas tempon en la
nuna semajno.” Sed hodiaŭ Gyeongsim diris al mi, ke ŝi vidis
mian amikinson en Sasang kaj ŝi manĝis pulgokion en busana
restoracio kun amerika viro. Kion vi pensas pri tiu historio? Mi
pensas, ke ŝi ne estas via vera bona amikino.

.....
.....
Jes, tia estis la vivo iam en Koreio.
..... Nenie vivas tiaj hundoj.

.....
Ĉiam
Matene la suno estas malantaŭ la montoj.
.....
.....

Mi pensas, ke tio estas vera.
.....

La azenido povas ludi kun sia patrino.
..... Ĝi nomiĝas porkido.
..... Neniam.

.....
..... Inae faris tion.
..... Ĉar ili ne havas
flugilojn.
..... Dong Daegu estas pli granda.
..... Aŭstralio.
.....
Poste.
..... Ĝi estas en la
Jirisan.
..... La hundeto
estas la plej maljuna.
..... Sep tagoj.
.....
..... Ĝi komenciĝas en januaro kaj
finiĝas en decembro.
..... Vi malbone
scias. La kvina monato estas majo.
.....
Jes, tio estas vera.
..... Vespere.
..... Jinsim estas.
.....
..... Mi pensas, ke ŝi estas via bona amiko.

Antaŭ multaj jaroj du hungaroj laboris en domo en urbo New York, kie ankaŭ Ban Kimun laboras. Ili pensis, ke en amerika urbo neniu parolas hungare, ĉar tie ĉiuj homoj parolis nur angle. Tial ili parolis hungare kaj pensis, ke aliaj homoj ne scias pri kio ili parolas. Ili iris en ĉambregon kaj vidis tie belegan junan virinon. Ankaŭ ŝi laboris en tiu domo kaj ŝi balais kaj purigis la ĉambrojn. Tiam la unua hungaro diris al la dua en hungara lingvo, kion li volis fari kun la belega juna virino. Poste ankaŭ la virino ekparolis kaj ŝi diris hungare: “*Mi ne pensas, ke vi havas tiom da mono.*” – Tiun historion mia angla instruisto rakontis al mi antaŭ tridek jaroj. Li pensis, ke oni povas bone instrui lingvojn per ŝercoj. Sed mi ne scias, Ĉu tiu rakonto estas vera aŭ ne vera. Ĉu vi pensas, ke tio estas vera historio?

..... Ĉu mi bone pensas, ke la virino malbone parolis hungare? Mi pensas, ke ŝi ne komprenis pri kio la viroj parolis, ĉar ŝi parolis pri mono, sed la viroj ne parolis pri tio. Ĉu mi bone pensas?

..... Pri kio parolis la unua viro? Ĉu vi pensas, ke li volis manĝi bibimbapon kun la virino aŭ ĉu li volis dormi kun ŝi?

..... Ĉu povas esti, ke la viro volis manĝi malkaran kimĉion kun la virino sed ŝi volis manĝi ege karan pulgokion? Ĉu povas esti, ke pro tio la virino pensis, ke la hungaro ne havas tiom da mono?

..... Ĉu tiu historio instruas, ke oni ne parolu hungare en New York?

Ĉu tiu historio instruas, ke oni ĉiam pensu, ke aliaj homoj povas ĉie kompreni kion oni diras?

.....
Kion pensis la virino? Ĉu ŝi pensis, ke la hungaro estis riĉa aŭ malriĉa?

..... Ĉu ŝi volus dormi kun li, se li estus riĉa?

..... Ĉu la hungaro volus dormi kun la virino, se li havus multe da mono?

..... Ĉu la koreaj aŭtobusoj estas grandaj por tridek homoj?

..... Ĉu oni povas havi litojn por ses homoj en via ĉambro?

..... Ĉu la libro de Stano Marček estas bona por infanoj aŭ por maljunaj homoj?

..... Ĉu vi pensas, ke instrui lingvojn per ŝercoj estas bona? Aŭ malbona?

..... Hodiaŭ estas naskiĝtago de via amiko. Ĉu vi donas florojn al li, aŭ librojn? Aŭ ĉu vi faras bongustan vespermanĝon por li?

..... Ĉu estas ĉambro por gastoj en la Indramang Universitato?

..... Kion vi faras, kiam vi havas hejme nenion por manĝi?

.....

Hajeong, mi vidas, ke vi ne faris hejmtaskon. Ĉu mi donu al vi plumon por ke vi skribu hejmtaskon? Ne donu al mi plumon, ĉar mi havas multe da plumoj. Tempon mi ne havas, sed tempon vi ne povas doni al mi. Mi malbone parolas koree. Kial vi ne parolas malrapide, ke mi komprenu vin?

.....
Ĉu vi studas en universitato por ke vi poste havu bonan laborejon aŭ por ke vi sciu? Aŭ por ke vi havu bonan vivon?

.....
Kiam diras Gabor en la klasĉambro, ke vi demandu? Ĉu kiam vi scias ĉion, aŭ kiam vi ne scias ion?

..... Kion vi volas?

Ĉu mi instruu vin pli rapide aŭ pli malrapide?

..... Diru al mi, kiom jara vi estas!

..... Diru al mi: Ĉu

vi volas esti mia amiko por ĉiam aŭ nur por ĉi tiu nokto?

..... Kion

diras la instruisto al la infanoj, kiam ili ne skribas bele?

..... Mia kara

Jinsim, vi diris al mi, ke hodiaŭ vespere ni manĝu kune en via hejmo en Dong Daegu. Sed hodiaŭ vespere mi ne havas tempon. Ĉu vi volas, ke mi iru al vi morgaŭ vespere? Aŭ ĉu vi povos veni al mi al la Jirisan morgaŭ?

Inter Busan kaj Seoul estas multaj tuneloj. Ĉu la vagonaro veturas tra tiuj tuneloj?

Ĉu ankaŭ la autobusoj veturas tra la tuneloj?

..... Kiel vi ŝatas rigardi la arbojn en via domo? Ĉu tra la fenestroj? Ĉu tra la pordo?

..... Kie vi ŝatas rigardi arbojn? Ĉu en televido? Ĉu en bildlibroj? Ĉu en la montaro?

..... Kiam vi rigardas arbojn? Ĉu kiam multaj floroj estas sur ili, aŭ kiam ili havas fruktojn?

..... Kiam havas la arboj florojn kaj kiam havas ili fruktojn en Koreio?

..... Ĉu vi veturas tra multaj montoj kaj riveroj kiam vi veturas el Seoul-yeog al Myeongdong-yeog?

..... Ĉu vi veturas tra la Han rivero kiam vi veturas inter Gangbyeon kaj Gangnam?

..... Ĉu vi veturas super la Han rivero, aŭ sub la Han rivero kiam vi veturas inter Gangbyeon kaj Gangnam?

Mi scias, ke la Kyunghee Universitato estas tre granda. Ĉu la studentoj iras en la universitaton tra pordego kaj vespere ili iras el la universitato tra alia pordego?

..... Kiel vi iras en vian domon? Ĉu tra la fenestro?

Kio estas ĉirkaŭ via domo? Tie estas nia ĝardeno. Apud la Indramang Universitato estas malgranda ĝardeno. Sed kio estas

ĉirkaŭ la universitato?

..... Ĉu ĉiuj koreaj homoj havas kravaton

ĉirkaŭ sia kolo? Ĉu la

universitataj studentoj havas kravaton ĉirkaŭ sia kolo kiam ili

laboras en la ĝardeno de la universitato?

..... Jinsim, mia malnova amikino diris al mi, ke mi iru al sia domo en Dong Daegu ĉirkaŭ la sesa horo vespere. Ĉu mi bone komprenas, ke mi povos alveni je la sesa horo kaj dek minutoj? Ĉu mi povos alveni ankaŭ noktmeze?

..... Minmin diris al mi, ke la Esperanto Oficejo estas ĉirkaŭ cent metrojn de la Mapo-yeog. Ĉu mi bone komprenas, ke estas cent domoj inter la Oficejo de la Korea Esperanto Asocio kaj la Mapo-yeog?

..... Tagmeze multaj homoj sidas ĉirkaŭ la granda tablo en la manĝejo de la Silsangsa. Ĉu estas homoj kiuj sidas kontraŭ aliaj homoj? Ĉu ili estas malamikoj?

..... Kio estas kontraŭ via domo? Ĉu lernejo? Ĉu ĝardeno? Ĉu alia domo?

..... Ĉu la domoj staras unu kontraŭ la alia en via strato?

Kiu estas kun vi kaj kiu estas kontraŭ vi? Ĉu viaj amikoj estas ĉiam kun vi? Ĉu

estas via vera amiko kiu estas kun vi, kiam vi estas feliĉa, sed
estas sen vi, kiam vi estas malfeliĉa?
..... Ĉu vi lernus anglan
lingvon, se vi havus tempon?
..... Ĉu vi laborus
ĉiutage, se vi estus riĉa? Ĉu vi
rigardus filmon, se vi havus televidon?
..... Ĉu vi estus feliĉa, se vi havus multe
da mono? Ĉu vi estus
feliĉa, se vi havus sanon, sed havus malmulte da mono?
..... Kiu estas riĉa homo kaj
kiu estas malriĉa homo?
..... Ĉu mi bone pensas,
ke la riĉaj homoj estas ĉiam feliĉaj?
..... Ĉu la riĉajn homojn
ĉie amas la virinoj? Ĉu vi
havas multe da amikoj, se vi havus multe da mono?
..... Kion volas
havi la homo en la Esperanto libro de Stano Marček? Ĉu
flugmaŝinon aŭ flugilojn?
..... Li diras, ke li
estus feliĉa, se li havus flugmaŝinon. Kial li pensas tiel? Kion li
farus, se li havus flugmaŝinon?

La patrino donis du ĉokoladojn al sia filo kaj diris, ke unu el ili estu por li, la alia por lia fratino. Vespere la fratino alvenis hejmen kaj sia frato ne povis doni la ĉokoladon al ŝi. *“Mi scias, ke vi manĝis du ĉokoladojn.”* – diris la patrino. *“Mi manĝis nur unu el la ĉokoladoj kaj la kato manĝis la alian, kiam mi ne estis en la ĉambro.”* – respondis la infano, kaj demandis: *“Kion vi havas kontraŭ mi?”* La patrino respondis: *“Hieraŭ aŭto mortigis la katon en la strato antaŭ nia domo.”* - Ĉu vi pensas, ke estas vera, kion la infano diris? Ĉu ne vera? Kial ne?

..... Kiel nomiĝas infanoj de bestoj kaj kiel nomiĝas gepatroj de bestidoj?

Kion donas kokinoj kaj bovinoj al la homoj? Ĉu mi bone scias, ke ankaŭ kokoj donas ovojn?

..... Ĉu la Himalaya estas tiel alta kiel la Jirisan? Ĉu mi bone pensas, ke la Namsan estas pli alta ol la Himalaya, ĉar la Namsan estas la plej alta monto?

..... Ĉu vi ĉiam povas fari kion ajn vi volas? Ĉu vi ne povas fari ĉiam kion ajn vi volas, ĉar vi ne havas tiom da mono?

..... Kion vi faras en via forno en via ĉambro? Ĉu la lampo aŭ

la fajro en la forno donas pli da lumo?

..... Kiam estas tagmezo kaj kiam estas noktmezo?

..... Ĉu vi havas manĝoĉambron kaj ankaŭ dormoĉambron en via domo? Ĉu ankaŭ gastoĉambron?

En la Silsangsa manĝejo oni vespermanĝas je la sesa horo. Ĉu oni povas diri je la tria horo, ke oni baldaŭ vespermanĝos? Kiam oni povas diri tion?

..... Kiu sidas dekstre kaj kiu sidas maldekstre en Koreio, kiam la junaj homoj geedziĝas? Ĉu la nova edzo sidas dekstre kaj la nova edzino maldekstre?

Ĉu la koreaj familianoj sidas ĉirkaŭ la manĝotablo aŭ ili sidas unu apud la alia?

Ĉu ankaŭ la infanoj sidiĝas ĉirkaŭ la familia tablo aŭ ĉu ili sidiĝas ĉirkaŭ alia malgranda tablo?

..... Ĉu la patro aŭ la patrino portas la manĝojn al via tablo en via familio?

..... Ĉu mi bone scias, ke estas koreaj familioj, kie la avino alportas la manĝojn sur la tablon?

Ĉu mi bone scias, ke en flugmaŝinoj oni donas mantukojn antaŭ la manĝoj?

Kiun manĝon vi ŝatas kaj kiun vi ne ŝatas? Mi ŝatas panon kun butero sed mi tute ne ŝatas toinjang (tenĵang) supon. Kiujn fruktojn vi malŝatas?

..... Ĉu vi ŝatas legoman supon?

..... Kion vi havis hieraŭ por tagmanĝo?

..... Por kio ni vivas kaj por kio ni manĝas?

Por kio vi studas en la Indramang Universitato kaj por kio vi lernas Esperanton?

..... Ĉu vi flugus super la kampoj se vi havus flugmaŝinon?

..... Ĉu mi bone scias, ke la birdoj povas flugi super la kamparo sen flugmaŝino? Ĉu vi scias, kiel ili povas fari tion?

..... Kio povas pli rapide flugi: birdo aŭ flugmaŝino?

Kio povas pli alte flugi: birdo aŭ flugmaŝino?

..... Ĉu koreoj faras legoman supon sen terpomoj kaj brasikoj?

..... Ĉu legoma supo havas viandon, aŭ ĉu ĝi estas senvianda manĝo?

..... Ĉu mi bone scias, ke en la

Silsangsa oni havas senviandajn manĝojn?

..... Ĉu mi bone scias, ke la kuko estas besto kaj ankaŭ la kukino estas besto?

..... Kio estas pli bongusta: piro aŭ pruno?

..... Ĉu mi bone scias, ke pomo kaj terpomo estas fruktoj kaj la pomo estas sur la arboj kaj la terpomo estas en la tero?

Ĉu la pomsupo estas legoma supo? Ĉu fruktosupo?

..... Kiam vi ekmanĝas? Post kiam ĉiuj manĝoj estas pretaj aŭ antaŭe?

..... Kiel manĝas la koreaj homoj? Ĉu ili manĝas supon antaŭe aŭ poste? Ĉu je la komenco de la manĝo, aŭ je la fino de la manĝo?

..... Ĉu vi havas bonan apetiton?

..... Ĉu ankaŭ malsana homo havas bonan apetiton?

..... Ĉu vi havas kukojn post la manĝoj en via familio ĉiutage, aŭ nur dimanĉe?

..... Kiel vi babilas kun viaj geamikoj? Ĉu vi babilas ĉiam pri la samaj aferoj, aŭ ĉu vi ŝatas babili pri diversaj aferoj?

..... Kio estas via nomo kaj kiom jara vi estas?

Kie estas la instruisto? Ĉu en la ĉambro? Li estas en la domo.
Je la komenco de la somero mi iris al Jagalchi restoracio kun
japana bela virino. Ni manĝis bibimbapon kun kimĉio. Poste ŝi
diris al mi: „*La somero estas tre bela en Koreio kaj la bibimbapo
estas tre bongusta. Mi amas vin kaj mi volas edziniĝi al vi kiam
ajn kaj kie ajn.*” Ĉu mi bone pensas, ke ŝi volis edziniĝi al mi en
julio kaj en aŭgusto, sed ne en septembro, ĉar septembro jam

ne estas somera monato?

..... En julio kaj en aŭgusto mi estis en Ameriko
kaj tial mi ne povis edziĝi al ŝi. Kion mi nun faru? Ĉu mi skribu
leteron al ŝi al Yokohama?

.....
Kiam vi helpas vian patrinon? Ĉu kiam ŝi estas juna? Ĉu kiam ŝi
estas maljuna? Ĉu ĉiam?

..... Kiu helpis vin ĝis nun en via vivo?

..... Ĉu estis homoj, kiuj malhelpis
vin?Vi loĝas en Seoul kaj via

amiko loĝas en Busan. Kion vi faras, kiam vi volas vidi lin? Ĉu vi
veturas al Busan per vagonaro por vidi lin aŭ skribas leteron al
li, ke li venu al Seoul?

..... Ĉu vi havas dek minutojn por
paroli kun mi? Mi volas rakonti al vi pri mia vivo en Ameriko.

..... Mi vidas, ke estas
granda gamarbo en la korto de la Silsangsa. Ĉu vi scias, por

kiuj estas la fruktoj sur tiu arbo?
 Ĉu vi volas esti
 mia amiko por ĉiam aŭ nur por ĉi tiu somero?
 Eŭropa proverbo diras:
 “*Oni ne vivas por manĝi, sed manĝas por vivi.*” – Kion vi pensas
 pri tiu diro?
 Kion vi faras, kiam via edzo fermas la pordon, sed vi ne havas
 alian ŝlosilon? Ĉu vi eliras tra la fenestro? Aŭ ĉu vi dormas en
 via ĉambro en la tuta tago?
 Ĉu vi jam
 tralegis la Esperanto libron, aŭ ĉu vi nur trarigardis ĝin?
 Ĉu vi jam faris ĉiujn hejmtaskojn?
 Ĉu vi jam trairis la
 tutan Jirisanan montaron, aŭ vi iris nur tra la montoj inter Inwol
 kaj Sannae? Ĉu
 vi kuris ĉirkaŭ la domo en via ĝardeno kiam vi estis juna infano?
 Kie sidas la homoj
 en la manĝejo de la Silsangsa? Ĉu ili sidas ĉirkaŭ la tablo aŭ
 sub la tablo?
 Ĉu estas nun lingvo, kiun ĉiuj homoj komprenas?
 Ĉu estas homoj en Koreio, kiuj
 komprenas nur la lingvon de la forto?
 Ĉu ankaŭ
 en aliaj landoj?

Kie estas la Indramang Universitato? Ĉu en la Namsan? Ne. Ĝi estas en la Jirisan. Ĉu vi pensas, ke estus bone, se ĉiuj homoj lernus la saman lingvon? Kial vi pensas tiel?

.....
Nuntempe estas multaj koreoj en Eŭropo, en Japanio, en Ĉinio kaj ankaŭ en Ameriko. Ĉu ili ĉiuj parolas la saman lingvon?

..... Ĉu estas malsama la korea lingvo en Koreio kaj en Japanio?

..... Kiu ekmanĝas en la koreaj familio? Mi legis en libro, ke en Japanio la viro ekmanĝas kaj poste manĝas la virino. Ĉu ankaŭ en Koreio estas tiel, aŭ en Koreio ĉiuj familioj ekmanĝas en la sama tempo?

..... Kiajn tukojn havas la koreoj? Ĉu tablotukojn? Ĉu bantukojn? Ĉu buŝtukojn? Ĉu ankaŭ bustukojn?

..... Ĉu mi bone scias, ke koreoj ne purigas sian buŝon per bustuko en la aŭtobuso, sed ili purigas sian buŝon ankaŭ en la aŭtobuso per buŝtukoj?

..... Kiam manĝas oni supon en Koreio? Ĉu je la komenco de la manĝo, aŭ je la fino de la manĝo?

Kie estas la

manĝilaro sur la tablo? Ĉu dekstre de la teleroj, aŭ maldekstre?

..... Ĉu estis
interesa afero en via urbo en la antaŭa monato?

..... Ĉu vi scias,
ke estis interesa kaj bela tago en la Silsangsa en majo? Tiam
estis la naskiĝtago de Budho kaj multaj homoj venis al la temp-
lo. Ĉu ankaŭ en via urbo estis multaj homoj tiam?

..... Mi scias,
ke hieraŭ oni ne havis bonajn manĝojn en la restoracio, ili havis
nur panon kaj maljunajn fruktojn. Ĉu vi prenis almenaŭ iom da
fruktoj por ke vi ne estu malsata?

..... Ĉu vi prenas kukojn post la
manĝo kiam vi estas hejme?

..... Kion vi ŝatas fari post
la manĝo? Ĉu vi trinkas tason da nigra kafo aŭ verda teo?

..... Kian koloron
havas la matura pomo kaj kia kolora estas la alia pomo?

..... Kiam
maturiĝas la gam fruktoj en Koreio kaj kio maturigas ilin? Ĉu la
suno aŭ la varma vetero?

..... En kiu sezono estas la vetero
la plej bona en Koreio?

..... Kiom da sezonoj kaj kiom da
monatoj estas en jaro?

Antaŭ kelkaj tagoj Gyeongsim diris al mi, ke Jinsim, mia malnova amikino manĝis pulgokion en busana restoracio kun amerika homo kaj ili ridetis en la tuta tempo. Pro tio mi diris al Jinsim, ke ŝi rakontu al mi, kiel tio estis. *“Estis tiel – komencis la rakonton mia amikino – ke mi promenis en Jagalchi kaj ankaŭ amerika homo promenis en la sama strato. Li diris al mi, ke mi estas tre bela kaj demandis, kion mi faras. Mi diris al li, ke mi vivas en Dong Daegu kaj mi laboras en Busan. Kaj mi diris, ke mi ne nur laboras, sed mi ankaŭ lernas esperanton. Tiam John pensis, ke tio estas tre interesa. Poste ni kune promenis kaj tiam John diris, ke li volis, ke mi parolu al li pri tiu lingvo. Pro tio ni iris en restoracion kaj mi rakontis al li pri la esperanto.”* Mi komencis kompreni la aferon, sed mi ne sciis, kial ili ridetis en la tuta tempo. *“Estis tiel –rakontis mia amikino – ke mi diris al John, ke mia instruisto instruas per ŝercoj. Mi rakontis al li la ŝercojn kaj li pensis, ke la ŝercoj estis interesaj. Pro tio ni ridetis en la tuta tempo.”* – finis la parolon Jinsim. Nun mi ne scias, ĉu tiu historio estas vera aŭ ne.

Ĉu vi pensas, ke mia amikino vere amas min kaj ŝi amas ankaŭ esperanton?

Ĉu estis pro tio, ke ŝi rakontis al la amerika homo pri tiu lingvo?

Ĉu John vere interesiĝas pri esperanto? Aŭ ĉu li interesiĝas nur pri mia Jinsim?

Vi havas kvin pomojn. Kiom da infanoj povas manĝi el ili, se ĉiuj infanoj volas manĝi duonon da pomo?

..... Vi havas dekdu prunojn kaj vi manĝas trionon

de ili vespere. Kiom da prunoj vi povos manĝi matene?

..... Via lernejo havas sesdek kukojn. Kiom da kukoj povas manĝi la instruistoj, se du trionojn de la kukoj manĝas la lernantoj?

..... En la kokina dometo matene estis multaj ovoj. Unue via patro iris en la dometon kaj prenis duonon de la ovoj. Poste via patrino iris en la kokinan dometon kaj vidis, ke tie estis kelkaj ovoj. Ŝi prenis tri kvinonojn de la ovoj. Poste la kokino iris en la dometon kaj vidis, ke nur malmultaj ovoj estis tie. Pro tio ŝi donis unu ovon al la ovaro. Poste vi iras al la dometo kaj vidas, ke naŭ ovoj estas tie. Kiom da ovoj estis en la dometo matene?

Nun estas la oka horo kaj duono. Kioma horo estos post dek minutoj? Ĉu la oka kaj dudek minutoj?

..... Kioma horo estis antaŭ dek kvin minutoj?

..... Kioma horo estos post tridek minutoj?

..... Kiam estos la oka kaj tri kvaronoj?

..... Ĉu mi bone scias, ke ses estas duono de dudek?

..... Kiom estas dekono de cent?

..... Ĉu mi bone scias, ke flugmasino estas ilo por mezuri la tempon?

..... Ĉu mi bone scias, ke kombilo estas ilo por manĝi?

..... Kion montras la montriloj sur la horloĝo?

..... Ĉu ili montras, ke la vetero estas varma aŭ malvarma?

..... Kiom da montriloj havas horloĝo kaj kiaj ili estas?

Kiel puriĝas viaj dentoj pli bone: se vi purigas ilin per elektra
dentopuriligo aŭ se vi purigas ilin per via mano?

..... Kiom da muroj kaj kiom da
plafonoj estas en via ĉambro?

Ĉu oni havas tablohorloĝon sur la muro kaj murhorloĝon sur la
tablo? Ĉu ĉiuj
preĝejoj havas nur unu turon? Ĉu
estas preĝejoj en Koreio, kiuj ne havas turon?

..... Ĉu vi jam vidis kvarturan preĝejon?

..... Kie preĝas la homoj? Ĉu en la
preĝejoj aŭ en la kortoj de la preĝejoj?

..... Ĉu estas homoj, kiuj
preĝas kaj matene kaj vespere?

..... Ĉu mi bone pensas, ke turhorloĝo estas
sur la antaŭbrako kaj brakhorloĝo estas sur la turo?

..... Kiom da brakoj vi havas?
..... Ĉu vi havas vian brakhorloĝon
sur via dekstra aŭ maldekstra antaŭbrako?

..... Ĉu mi bone scias, ke ne estas turoj
en la Silsangsa, sed oni havas du turhorloĝojn tie?

..... Kiel vi vekiĝas matene?
Ĉu via vekhorloĝo vekas vin aŭ via edzo vekas vin?

..... Ĉu vi scias, kio estas sunhorloĝo?

..... Ĉu mi bone pensas, ke sunhorloĝo ne povas montri la tempon nokte?

..... Ĉu mi bone pensas, ke sunhorloĝo povas montri la tempon nokte nur se estas multe da lumo en la strato?

Kian horloĝon vi havas?

Ĉu vi havas mezurilon kiu montras kiom alta vi estas?

..... Kie estas la plej alta turo en Koreio?

..... En via klaso estas kvin studentoj. Kiom da pomoj vi havas, se vi povas doni al ĉiu studento tri pomojn?

Kiom da pomoj vi havas, se vi povas doni al la studentoj po du pomoj?

..... Ĉu vi povas doni al la studentoj po tri pomoj se vi havas dektri pomoj?

..... Ĉu homoj havas sur ĉiu mano po kvar fingroj?

..... Ĉu vi povas tralegi centpaĝan libron en naŭ tagoj se vi legas po dekunu paĝoj ĉiutage?

..... Kion vi ŝatas trinki post vespermanĝo? Ĉu bieron? Ĉu vinon?

..... Ĉu la studentoj povas eltrinki po du glasoj da vino?

..... Ĉu vi pensas, ke mi vere povas trinki ok grandajn glasojn da vino?

Se estas kvin homoj en via klaso, tiam ĉu vi estas kune paro aŭ kvinopo? Kiom da domoj estas en doma triopo? Kiom da lernantoj estas en via klaso, se ili staras en la korto en kvar vicoj po du? Kiom da homoj estas en la familio de Kim Gyeongnim, se ili ĉiam kune manĝas kaj ili ĉiam manĝas kvarope?
..... La familianoj de Seo Gyeongjae ĉiam rigardas televidon triope en la labortagoj. Tiam Seo Gyeongjae ne estas kun ili, ĉar li laboras en alia urbo. Kiom da homoj estas en ilia familio? Kiom da ovoj estas en la domo, se ova triopo estas en la kuirejo kaj ova kvaropo estas en la ĉambro?
En la preĝejo preĝas triopo. Ĉu mi bone pensas ke ili povas esti la gepatroj kun la du gefiloj?
..... Kiom da piedoj vi havas?
..... Oni povas iri per piedoj el la Indramang Universitato al la Silsangsa en dek kvin minutoj. Ĉu tio estas longa iro aŭ mallonga?
..... Ĉu tio estas iro aŭ irado?
..... Kiam vi skribas leteron al via amikino, tiam ĝi estas ĉu skribo aŭ skribado?

..... Ĉu estas skribo aŭ skribado, se oni skribas dek leterojn ĉiutage?

Hieraŭ Hanna laboris en la ĝardeno de la Indramang Universitato en la tuta mateno kaj Hajeong laboris en la tuta semajno. Kiu el ili laboris kaj kiu laboradis?

..... Kara An instruis esperanton en la Jirisan dufoje en marto kaj Gabor instruis tie de aprilo ĝis la fino de junio. Kiu el ili instruis kaj kiu instruadis?

..... Mi vidis, ke estis lumo en via fenestro en la tuta nokto. Kion vi lernadis?

..... Ĉu vi povas diri, ke vin doloras la piedoj, kiam viaj piedoj doloras?

..... Kies dentoj doloras? Ĉu la dentoj de viro, kiu ĉiutage purigas siajn dentojn aŭ la dentoj de virino, kiu purigas ilin dufoje en jaro? Ĉu viaj piedoj doloras de longa irado aŭ de maljuna aĝo?

..... Ĉu mi bone scias, ke la dentoj de maljunaj homoj ĉiam doloras?

..... Kion vi ŝatas fari en viaj ripoztagoj? Ĉu bicikladon, naĝadon, filmrigardadon aŭ legadon?

..... Ĉu mi bone scias, ke vi ŝatas promenadon duope en la noktaj arbaroj?

..... Ĉu vi povis bone dormi en la tuta nokto?

Kiam diras homoj, ke baldaŭ estos tagmezo? Ĉu je la dekunua horo kaj kvindek minutoj aŭ je la dekdua horo kaj kvin minutoj? Kiam diras homoj, ke baldaŭ estos tagmezo? Ĉu je la dekunua horo kaj duono aŭ je la naŭa horo kaj kvarono? Ĉu vi rigardadas televidon ĉiutage? Gyeongsim rigardas filmon ĉiutage sed Inae rigardas filmon nur ĉiusemajne. Kiu el ili rigardadas filmon? Kio estas kvin? Ĉu ĝi estas duono de dek aŭ ĉu ĝi estas duopo? Ĉu vi kaj via amikino estas duopo? La infanoj estis malsataj sed ili ne havis pomojn kaj ne havis pirojn. La patrino donis al ili po du piroj. Kvar infanoj estis en la domo. Kiom da pomoj havis unu el la infanoj poste? Kiom da pomoj havis ĉiuj infanoj poste? Kiom da piroj havis unu el la infanoj poste? Kiom da piroj havis ĉiuj infanoj poste? Poste ĉiu infano manĝis unu piron. Kiom da piroj havis poste la infana kvaropo? Kiu ludadas el la infanoj? Ĉu

kiu ludas dek minutojn kaj poste lernas en la klasĉambro aŭ kiu estas malsana kaj pro tio ne iras al la lernejo sed hejme ludas en la tuta tago?

Du pomoarboj estas en mia ĝardeno. Sur la maljuna arbo estas cent pomoj kaj sur la juna arbo estas duoble pli da pomoj. Kiom da pomoj estas sur la juna arbo?

Ĉu mi bone scias, ke sur la maljuna arbo estas triono de la pomoj ol sur la juna arbo?

..... Kiom da pomoj estas en mia tuta ĝardeno?

Kiom estas la duono de cent?

Kiom estas duoble kvar?

Ĉu mi bone pensas, ke kvaroble kvin estas dudek unu?

..... Hajeong faris lunde tri hejmtaskojn sed marde ŝi faris duoble pli da hejmtaskoj. Kiom da hejmtaskoj ŝi faris marde?

..... Ĵaŭde ŝi faris dekdu hejmtaskojn sed vendrede ŝi faris nur trionon da hejmtaskoj. Kiom da hejmtaskoj ŝi faris vendrede?

..... Hieraŭ mi faris grandan laboron sed hodiaŭ mi faris duoblan laboron. Kiam mi faris pli grandan laboron? Ĉu hieraŭ aŭ ĉu hodiaŭ?

..... Ĉu mi bone scias, ke vi havas edzon kaj via edzo estas amerika viro?

Mi havas multe da mono, sed Jinsim, mia malnova amikino en Dong Daegu havas kelkoble pli da mono ol mi. Kiu el ni estas riĉa kaj kiu estas malriĉa?

..... Eŭropa proverbo diras, ke “*Kiu donas rapide, tiu donas duoble.*” Ĉu mi bone komprenas, ke tiu proverbo instruas, ke doni malrapide estas pli bona ol doni rapide?

Soyeon manĝas matene, tagmeze kaj ankaŭ vespere, sed Maneog neniam manĝas tagmeze. Ĉu mi bone pensas, ke Soyeon manĝas dufoje tage kaj Maneog manĝas trifoje tage?

..... Kiomfoje vi manĝas en la labortagoj kaj kiomfoje en la ripoztagoj?

..... Kiomfoje vi manĝas en viaj naskiĝtagoj?

Via amikino naskis infanon antaŭ tri tagoj. Ĉu vi estas feliĉa? ...

..... Pro kio vi estas feliĉa?

..... Kiomfoje manĝas la infano tage kaj kiomfoje manĝas via amikino?

..... Kion faras la studentoj kiam ili volas manĝi en la restoracio? Ĉu ili manĝas en la restacio unue kaj iras al la restoracio poste, aŭ iras al la restoracio unue kaj manĝas en la restoracio poste?

Tri soldatoj estas en la arbaro kie ili trovas multajn malamikojn.
La unua povas pafi kvinfoje en du minutoj kaj la dua povas pafi
okfoje. La tria ne havas pafilon. Kiu el ili estas bona soldato? ...
..... Kiu estas la plej bona kaj kiu el ili
estas la plej malbona?
..... Kial vi pensas tiel?
.....
Ĉu homo povas naskiĝi kaj morti nur unufoje aŭ multfoje?
..... Kia estas la aero en
Seoul en julio? Ĉu varmeta aŭ varmega?
..... Per kio vi povas mezuri la tempon?
..... Ĉu vi povas mezuri,
ke Hanna estas pli alta aŭ Hajeong estas pli alta en la klaso?
..... La patrino de Jinsim
faras veston por Jinsim. Antaŭ tondo ŝi ĉiam mezuras dufoje.
Ĉu vi pensas, ke mezuri dufoje estas pli bona ol unufoje?
..... Ĉu vi pensas, ke
mezuri trifoje estus pli bona ol mezuri dufoje?
..... Per kio ŝi tondas kiam ŝi
faras veston? Ĉu per tranĉilo?
..... Kiomfoje kisas vi
vian patrinon kaj kiomfoje kisas vi vian amikon aŭ edzon?

..... Ĉu mankas al vi via edzo kiam vi ne estas kune kun li?

..... Kion vi faras kiam vi estas malsata, sed mankas pano en via domo. Ĉu vi manĝas fruktojn?

Jinsim estas mia amikino kaj ŝi vivas en Dong Daegu. Mi volis vidi ŝin en ŝia urbo kaj pro tio mi iris tien multfoje. Sed ĉiufoje kiam mi estis ĉe ŝia domo, ŝi ne estis hejme. Ĉu povas esti, ke ŝi laboras en Busan ĉiutage? Kion mi faru nun?

..... Hanna hieraŭ faris sian hejmtaskon post longa laborado en la universitata ĝardeno, sed ŝia hejmtasko ne estis bona. Kion ŝi faru nun? Ĉu ŝi dormu? Ĉu ŝi faru la hejmtaskon ankoraŭfoje?

..... Mi jam dufoje diris al Soyeon, ke ŝi tre multe laboras en la ĝardeno. Pro tio ŝi ne havas tempon por lerni esperanton. Kion mi nun faru? Ĉu mi diru al ŝi tion trifoje? Aŭ cxu mi diru al ŝi, ke ŝi ripozu post la tagmanĝo? Aŭ ke ŝi pli longe dormu?

..... Ĉu vi jam flugis inter Koreio kaj Eŭropo kelkfoje aŭ nur unufoje?

..... Kiel oni flugas? Ĉu per flugiloj aŭ per flugmaŝinoj?

..... Ĉu ankaŭ la birdoj flugas per flugmaŝinoj?

Ĉu vivis foje reĝo en Koreio kiu havis tri filojn?

..... Ĉu vivis iam reĝo en Koreio kiu havis tri filojn?

Kiam estas pli agrable ekskursi: Ĉu kiam estas bona vetero, aŭ en januaro, kiam la aero estas malvarmega?

..... Ĉu ti signifas, ke oni ne ekskursas en januaro?

..... Kiu veturilo estas pli forta: biciklo aŭ aŭto? Ĉu vi ekskursas perpiede, per biciklo aŭ per aŭto?

..... Ĉu mi bone scias, ke elefanto estas pli malforta besto ol muso?

..... Ĉu vi vidis birdojn kiam vi ekskursis?

..... Ĉu ĉiuj infanoj ĝojis ekskursi en via klaso kiam vi iris al lernejo?

..... Kion vi ĝojas pli bone: filmrigardadon aŭ sidadon antaŭ televido?

..... Kiom da horoj sidas vi antaŭ televido monate?

Kio donas pli grandan ĝojon al vi: dancado kun via amiko aŭ bona parolado kun viaj familianoj?

..... Kiam estas vi pli feliĉa: kiam vi ekskursas en la Jirisan aŭ kiam vi manĝas bongustan pulgokion en bona restoracio en Mapo?

Kio estas pli agrable por la gestudentoj de la Indramang Univer-
sitato: labori en la universitata ĝardeno aŭ sidi en la klasĉamb-
ro?

Kio estas malagrabla por vi? Ĉu vekigi je la kvara horo matene?
Ĉu promeni apud bela rivero en malvarma vento? Ĉu alia?

..... Kiel vi iris
ekskursi kun viaj lernejoj kiam vi estis juna? Ĉu via instruisto
iris antaŭe? Ĉu malantaŭe? Ĉu la lernantoj iris duope aŭ unu-
ope sur la strato?

..... Ĉu vi ofte ekskursas aŭ malofte?

..... Ĉu Inae ofte faris
panon en la Himalaya kafejo?

..... Ĉu vi jam ĉirkaŭiris
vian domon aŭ vi ankoraŭ ne faris tion?

..... Multaj homoj diras,
ke por ili estas pli granda ĝojo preĝi en la Silsangsa ol rigardi
bonan amerikan filmon en la televido. Kiel vi pensas pri tio?

..... Ĉu
vi preĝas ĉiutage, malofte, aŭ ĉu vi ankoraŭ neniam preĝis en
via vivo?

Ĉu vi foje-foje haltas manĝi iomete kiam vi ekskursas aŭ ĉu vi
ekskursadas en la tuta tago?

Kiam vi manĝas iomete kaj kiam vi manĝas iomege?

.....

Mi legis, ke Chakeungang kaj Hangang estas riveroj en Koreio.
Kiu eli ili estas rivereto kaj kiu el ili estas riverego?
..... Kiam vi prenas du pomojn
post la manĝo kaj kiam vi prenas nur unu pomon?
..... Ĉu koreoj manĝas prunojn matene aŭ
vespere? Kiam mi
elbusiĝis, tiam mi vidis malgrandan domon. Oni skribis sur la
muron de la domo "Silsangsa". Sed mi ne sciis, ĉu mi estis en la
Namsan aŭ en la Jirisan. Kie estis mi tiam?
..... Se vi volas veturi el Hamyang
al Gangbyeon, tiam kie vi devas enbusiĝi kaj kie vi povas elbu-
siĝi?
..... Kion vi faras, kiam vi veturas per
vagonaro? Ĉu envagoniĝas aŭ enbusiĝas?
..... Ĉu mi bone pensas, ke envagoniĝo
signifas ke oni iras en la aŭtobuson?
..... Ĉu vi jam estis en loko
en la nokto, kie vi ne sciis, kie vi estis?
..... Kion vi faras,
kiam vi ne scias, kie vi estas? Ĉu vi demandas homojn? Ĉu vi
trinkas vinon? Ĉu besto estas
animalo? Kie vivas bestoj? Ĉu en

aero? Ĉu en akvo? Ĉu sur tero? Ĉu sub tero?

..... Ĉu mi bone scias, ke la naturo estas ĉio ĉirkaŭ ni, kion homoj faris?

..... Ĉu preĝejoj, belaj parkoj, grandaj domoj kaj lernejoj estas en la naturo?

..... Ĉu ankaŭ kampoj, floroj, arbaroj, montetoj kaj animaloj estas en la naturo?

..... Ĉu animaloj manĝas plantojn aŭ plantoj manĝas animalojn?

..... Mia amikino diris, ke ŝi vidis plantojn en Aŭstralio, kiuj manĝis bestojn. Ĉu vi pensas ke tio estas vera?

..... Kio estas pli bela? Ĉu la naturo aŭ granda nova urbo kun multe da lumo sur la stratoj?

..... Ĉu homoj povus vivi sen la naturo? Kial vi pensas tion? Ĉu vi jam kolektis florojn en la arbaro?

Ĉu vi kolektas monon por naskiĝtagoj de viaj klasanoj en via klaso? Kiam estas pli malagrabla en Busan en januaro? Kiam estas malvarmege kaj blovas ankaŭ forta vento aŭ kiam estas malvarmege sed ne blovas vento?

Kiom jara estis via patrino kiam vi naskiĝis?

Ĉu la mallonga montrilo montras la minutojn kaj la longa mont-
ras la horojn?

Ĉu ankaŭ en veturiloj estas montriloj?

Kie estas pli multaj montriloj? Ĉu en flugmaŝino aŭ en autobu-
so? Kiom da sekundoj estas en
duonminuto? Ĉu mi bone scias,
ke ne ĉiuj horloĝoj havas montrilojn?

..... Ĉu vi jam vidis elektran horloĝon?
..... Ĉu vi jam veturis per elektra
aŭto? Ĉu vi havas elektran
dentopurigilon? Kiel vi purigas viajn
dentojn? Ĉu per viaj manoj? Ĉu vi scias,
ke mi povas trinki tion en unu jaro?

Kiam vi estis infanoj, tiam vi staris en la korto de via lernejo, ĉu
ne? Ĉu vi staris po kvin en ĉiu vico?

..... Po kiom da horoj vi lernas ĉiutage?

..... Ĉu mi bone scias ke duopo estas
du homoj kune kaj triopo estas tri homoj kune?

..... Kio estas paro? Ĉu duopo aŭ triono?
..... Ĉu promenas paroj en la koreaj
parkoj vespere? Ĉu vi kaj
via edzo estas paro? Ĉu mi

bone scias, ke kiam du homoj geedziĝas, tiam estiĝas paro? ...
 Ĉu vi sciis, ke vi kaj
 via amikino kune ankaŭ estas paro aŭ duopo?
 Ĉu ankaŭ vi ne povis dormi en la
 nokto ĉar la kato bojadis en la tuta nokto?
 Kio bojis hieraŭ en la Silsangsa?
 Ĉu la blanka hundo, aŭ ĉu la musoj sub la arboj?
 Kie estas bojado en la
 tuta nokto? Ĉu en la vilaĝoj, kie en la ĝardeno de ĉiu familia do-
 meto estas hundo aŭ ĉu en urboj, kie estas nur malmultaj hun-
 doj?
 Hieraŭ matene Hanna ekparolis, sed post du minutoj ŝi eksilen-
 tis. Sed poste Soyeon parolis dum du horoj. Kiu el ili paroladis?
 Hungaroj diras, ke “*Miaj*
manoj doloras.” aŭ “*Mi havas doloron en miaj manoj.*” Aliaj
 homoj diras, ke “*Min doloras la manoj.*” Kiun parolon el ili vi
 ŝatas? Kiel diras tion la koreoj?
 La patro
 diras al la patrino: “*Veku la infanon, ĉar li baldaŭ devas iri al la*
lernejo!” Kion faris la patro, kion faros la patrino kaj kion faros la
 infano?

 Kio estas la nomo de la reĝino kiu nun vivas en London?
 Ĉu la Namsan estas Amerika monto?

Kies monto estas la Namsan? Ĉu de Myeongdong? Ĉu de Gangnam ?

Ĉu vi jam faris ekskurson al la naturo? Kiam vi faris tion?

..... Ĉu vi ekskursis kun aŭ sen viaj gepatroj? Kie estas belaj lokoj en Koreio, kien koreoj iras por ekskursi?

..... Ĉu estas nur arbaro en la naturo aŭ ankaŭ domoj estas tie?

..... Ĉu estas bestoj en la naturo aŭ nur arboj kaj floroj estas tie?

..... Kie vi ŝatas ekskursi? Ĉu en la naturo aŭ en grandaj urboj, kie estas multaj bonaj restoracioj kaj trinkejoj? ...

..... Ĉu vi legas gazetojn kiam vi ekskursas? En urbo Roma estas preĝejo kie dimanĉe pli ol dek mil homoj kune preĝas. Ĉu ili estas ĉiuj en la preĝejo aŭ kelkaj el ili estas en la korto de la preĝejo?

Kion vi pensas: Ĉu ĝi estas la Sankta Petro Preĝejo aŭ la Sankta Paŭlo Preĝejo?

Kiuj bestoj flugas super la kampoj kaj kiuj kuras sur la kampoj?

..... Ĉu vi povas iri tra la arbaro de la Jirisan en unu tago?

Ĉu oni povas veturi tra la arbaro de la Jirisan en unu tago per aŭtobuso? Kie estas kampoj?
 Ĉu en la vilaĝoj? Ĉu inter du vilaĝoj?
 Ĉu mi bone scias, ke multaj kampoj kune nomiĝas kamparo?
 Ĉu mi bone scias, ke malforta vento nomiĝas ventego?
 Kiam estas fortaj ventoj en Koreio: en printempo, en somero, en aŭtuno aŭ en vintro?
 Ĉu mi bone scias, ke ne nur ventoj, sed ankaŭ homoj povas blovi? Ĉu estas vera, ke nur malbonaj homoj blovas kaj bonaj homoj blovas neniam?
 Ĉu mi bone pensas, ke kiam la suno brilas, tiam la vento ne povas blovi? ...
 Mia fileto diris al mi, ke li pensas, ke vento neniam povas blovi en la nokto. Ĉu li bone pensas tion?
 Kie estas pli fortaj ventoj: en Seoul aŭ en la Jirisan?
 Ĉu estas herboj en Koreio, kion homoj manĝas?
 Ĉu vi jam estis en herbejo aŭ ĉu vi jam legis pri herbejoj?
 Kiun libron vi legis ĝis nun dufoje?
 Kiujn librojn volas vi legi dufoje aŭ trifoje?
 Kion mezuras la horloĝo kaj kion montras la kalendaro?

Hieraŭ Gyeongsim diris al mi, ke antaŭ kelkaj tagoj ŝi veturis el Hamyang al Sasang per aŭtobuso kaj poste ŝi iradis en la busanaj stratoj. Matene ŝi vidis, ke Jinsim, mia malnova amikino venis el sia hejmo kun amerika homo. Mi ne komprenis, kiel tio estis. Pro tio mi diris al Jinsim, ke ŝi parolu al mi pri tiu afero. *“Estis tiel – komencis la rakonton mia amikino – ke John vidis min promenante en strato de Busan kaj li demandis, kion mi faras. Mi diris al li, ke mi lernas esperanton. Poste li diris al mi, ke li volis, ke mi parolu al li pri tiu lingvo. Pro tio ni iris en restoracion kaj mi rakontis al li pri la esperanto. Li aŭskultis min kaj diris, ke mia parolado estis interesa kaj li volis rigardi mian Esperanto libron. Sed mi ne havis mian libron kun mi en la restoracio kaj pro tio ni devis iri al mia hejmo.”* Mi komencis kompreni la aferon, sed mi ne sciis, kion ili faris kune en la tuta nokto. *“Estis tiel –rakontis mia amikino – ke mi diris al John, ke mia instruisto instruas per ŝercoj. John pensis, ke tiuj ŝercoj estas interesaj kaj pro tio li volis legi ĉiujn ŝercojn en mia libro. Tiel ni tralegis la tutan libron en la nokto.”* – finis sian parolon Jinsim. Nun mi ne scias, Ĉu tiu historio estas vera aŭ ne. Ĉu vi pensas, ke mia amikino vere amas min kaj ŝi amas ankaŭ esperanton? Ĉu estis pro tio, ke ŝi montris sian Esperanto libron al la amerika homo? Jinsim diris, ke John ŝatis la ŝercojn en la Esperanto libro. Ĉu ankaŭ vi pensas, ke instrui lingvojn per ŝercoj estas interesa kaj bona? Ĉu vi pensas, ke John vere interesiĝas pri esperanto? Aŭ ĉu li interesiĝas nur pri mia

Jinsim?

Kion vi pensas pri ĉi tiuj demandoj?

..... En Eŭropo homoj tre ofte blovas la manĝojn kiam la manĝoj estas tre varmaj. Ĉu ankaŭ koreoj faras tion? Ĉu vi pensas, ke la bestoj pensas?

..... Kie vi tranoktas, kiam vi estas en alia urbo? Ĉu en gastejo? Ĉu en la domo de via amiko?

..... Kie vi tranoktas en alia urbo: en lito aŭ sur planko? Kion vi vidas, kiam vi rigardas el via ĉambro?

..... En via ĉambro estas nur televido kaj ĉirkaŭ via domo estas arbaro. Ĉu vi povas vidi la arbojn se vi ne rigardas el la fenestro de via ĉambro? Kion vi povas vidi tiam? Kion vi povas vidi se vi fermas viajn okulojn?

..... Estas du diroj: “*Rigardu la filmon en la televido vespere!*” aŭ “*Vidu la filmon vespere en la televido!*” Kiu el ili estas pli bona?

..... Eŭropaj homoj diras: “*Vidu, ne nur rigardu*” Kion signifas tiu diro? Ĉu tio signifas, ke mi rigardu la florojn kaj la birdojn sed mi ne pensu pri ili? Aŭ ĉu tio signifas, ke mi rigardu ilin kaj komprenu, ke la naturo estas belega?

..... Kion vi rigardos vespere en la televido?

Ĉu vi ĉiam vidas birdojn kiam vi rigardas el la fenestro de via ĉambro?

Ĉu vi ĉiam vidas la sunon kiam vi trarigardas vian fenestron? ...
..... Ĉu vi vidas ĉiam belajn virinojn kiam vi rigardas filmon en televido?

..... Kiom da televidiloj vi havas hejme? Ĉu povas esti, ke vi aŭskultas televidilon aŭ radioaparaton kaj vi ne aŭdas muzikon? Kian muzikon vi ŝatas aŭskulti: Ĉu korean, ĉu eŭropan ĉu amerikan?

..... Ĉu novan, ĉu malnovan? Kiu filmoj estas pli interesaj? Ĉu la malnovaj aŭ ĉu la filmoj de nia nuna tempo? Ĉu vi komprenas, kion mi diras al vi?

Ĉu vi komprenas, kion mi diras, kiam mi parolas en hungara lingvo? Ĉu vi komprenas la parolon de bestoj?

Ĉu vi komprenas, kial John volis legi la tutan Esperanto libron kun Jinsim en la nokto?

Ĉu vi ne scias, kion mi diras al vi, ĉar mi ne bone parolas koree?

Parolu al mi pri la historio de Jinsim kaj John kaj diru al mi, ĉu tio estas vera aŭ malvera.

..... Ĉu jam estis iam, ke vi rigardis sed vi vidis nenion?

..... Kiam tio estis kaj kiel tio estis?

..... Rigardu, super la arboj flugas du birdoj. Kiel estas, ke vi vidas nur unu el ili? Ĉu estas tiel, ĉar la alia estas tre malgranda?

..... Kial estas, ke en kelkaj filmoj mi ne vidas kolorojn kiam mi rigardas televidilon?

..... Ĉu povas esti, ke vi aŭskultas, sed vi aŭdas nenion?

..... Ĉu vi aŭdis la historion de Jinsaim kaj John, kiam Gyeongsim diris tion al vi?

..... Ĉu mi bone aŭdis, ke tiu historio estis en Jinju?

..... Ĉu mi bone aŭdis, ke vi ne faris hejmtaskojn por la hodiaŭa leciono?

..... Ĉu mi bone pensas, ke koreaj homoj ne ŝatas aŭskulti serĉojn kaj anekdotojn?

..... Kiajn virinojn ŝatas la viroj?

..... Ĉu kiuj multe parolas kaj malmulte diras, aŭ kiuj malmulte parolas sed multe diras?

Mia malnova amikino, Jinsim diris al mi en Dong Daegu, ke ŝi legis en libro, ke iam japanaj soldatoj estis en Koreio. Ĉu tio estas novaĵo? Matene mi legis en la gazeto, ke hieraŭ du homoj mortis en la Himalaya. Ĉu tio estas novaĵo? Ĉu mi bone pensas, ke novaĵo estas io malnova, pri kio ni jam aŭdis kaj legis? Ĉu mi bone scias, ke vino kaj biero estas trikaĵoj, sed akvo ne estas trinkaĵo? Ĉu ankaŭ limonado, lakto, kafo kaj ankaŭ teo estas trinkaĵoj? Ĉu mi bone lernis en la esperanto libro, ke ĉokolado, bombono, kuko kaj sukero estas alkoholaĵoj? Kio estas alkoholaĵo: Ĉu manĝaĵo aŭ trinkaĵo? Kiam havas koreoj dolĉaĵon: antaŭ tagmanĝo aŭ post tagmanĝo? Ĉu povas esti en Koreio ke infanoj ricevas alkoholaĵon en siaj lernejoj post tagmanĝo? Kiu pano estas pli dolĉa: la eŭropa pano aŭ la korea pano? Kia estas via vivo: ĉu dolĉa, ĉu maldolĉa? Ĉu mi bone pensas, ke sukeraĵo kaj dolĉaĵo estas la samo?

Kio estas en la ĉirkaŭaĵo de la Indramang Universitato?

..... Ĉu vi jam havis malagrabraĵon en via vivo? Kiam estis tio kaj kio estis tio?

..... Kion ŝatas havi koreaj homoj: Ĉu agrabraĵojn aŭ malagrabraĵojn?

..... Kio estis, kiam via patrino vidis, ke vi ploris? Ĉu ŝi demandis vin pro kio vi ploris?

..... Mi vidis en filmo, ke virino ploris kiam ŝi edziniĝis. Pro kio estis tiel? Ĉu virinoj povas plori, kiam ili estas feliĉaj kaj ankaŭ kiam ili estas malfeliĉaj?

..... Kial vi venis al mi?

..... Pro kio vi iris al la Silsangsa? Ĉu pro peto de viaj gepatroj?

..... Por kio vi iris al la Silsangsa? Ĉu por preĝi aŭ por lerni historion kaj geografion de la Jirisan?

..... Vi ricevas ĉokoladon de via amiko. Kion vi diras poste: “*Dankon pro tio*” aŭ “*Dankon por tio*”?

..... Ĉu mi bone pensas, ke “*Pro unu arbo li arbaron ne vidas.*” estas diro?

..... Ĉu tio signifas, ke la arbo antaŭ mi estas tre granda kaj pro tio mi ne vidas la aliajn arbojn?

..... Pro kio ridas homoj antaŭ la televidilo?

..... Ĉu vi ridas aŭ ploras, kiam vi aŭdas bonan anekdoton?

Kion vi faras kiam vi legas la historion de Jinsim kaj John en Busan? Ĉu vi ploras aŭ vi ridas?

Kion vi pensas, kiu el la du diroj estas pli bona: “*Vivu la riĉeco!*”, aŭ “*Vivu la amikeco!*”?

Kian altecon havas la amerikanoj kaj kian altecon havas la koreoj?

Kiom altaj estas la amerikaj homoj? Ĉu ili estas pli ol 170 centimetroj aŭ malpli?

Kio estas inter infaneco kaj matureco?

Ĉu mi bone pensas, ke maljuneco estas antaŭ matureco?

..... Ĉu estas vera, ke ankaŭ maljuneco havas sian belecon?

..... Pro kio ŝatas infanoj la instruistojn?

Ĉu pro saĝeco, ĉu pro stulteco?

Kion vi pensas? Ĉu grandeco estas bona aŭ malbona?

..... Ĉu mi bone pensas, ke riĉulo estas homo sen mono?

Kio estas junulo? Youko estas kvindekjara kaj Akiko estas sepdek kvin jara. Kiu el ili estas maljunulo kaj kiu estas maljunulino?

..... Ĉu povas esti, ke mia Jinsim ne amas min, ĉar mi estas malriĉulo?

Kio estas altaĝulo? Ĉu maljuna besto, aŭ maljuna homo?

..... Ĉu vi konas bonulojn en via ĉirkaŭaĵo?

..... Kio estas bonkorulo? Ĉu riĉa homo, kiu ĉiam donas monon al malriĉuloj?

..... Kiu lernas en la lernejo? Ĉu junuloj? Ĉu maljunuloj?

..... Kiu estas en malsanulejoj?

..... Ĉu mi bone pensas, ke malsanuloj laboras en malsanulejoj?

..... John diris al mia Jinsim, ke ŝi estas busana belulino. Kion signifas tio?

..... Kio estas karulo?

..... Ĉu mi bone pensas, ke ankaŭ kara pulgokio estas karulo en seoula restoracio?

..... Ĉu mi bone aŭdis, ke malkara kimĉio neniam povas esti karulo, ĉar ĝi estas malkara?

..... Kiu estis la plej saĝa reĝo en la korea historio?

..... Kiu estas la unuaj tri plej saĝaj saĝuloj en Koreio?

..... Ĉu mi bone pensas, ke saĝulino estas ĉiam maljuna viro kiu malmulte scias?

..... Mi vidis homon en malsanulejo, kiu pensis, ke kreto estis manĝaĵo kaj provis manĝi ĝin. Ĉu li estis stultulo aŭ saĝulo?

Kiu estis saĝulo en via unua lernejo?

Kion vi faras, kiam oni diras al vi, ke via flugmaŝino jam forflugis?

..... Mi vidas, ke hodiaŭ kelkaj studentoj mankas en la klaso. Kiu nun forestas?

..... Mi vidas, ke nun vi ne lernas, sed pansadas pri via amiko. Ĉu mi bone pensas, ke nun vi forestas? Vi tre

amas vian edzon, sed hieraŭ li devis flugi al Ameriko. Ĉu estas vera, ke li nun estas for de viaj okuloj sed ne for de via koro? Aŭ ĉu for de via koro, sed ne for de viaj okuloj?

..... Ĉu mi bone scias, ke sen spirado homo ne povas vivi?

Kiom longe povas vivi homo sen manĝo?

Kiom longe sen trinko? Kiom

longe sen dormo? Kaj kiom

longe sen spiro? Kiam vi laboras, kiam vi ripozas kaj kiam vi dormas?

..... Ĉu vi lernas esperanton krom via laboro aŭ apud via laboro?

..... Aŭ ĉu vi estas senlaborulo?

Kion vi pensas? Ĉu estas pli bona lerni esperanton krom la angla lingvo, aŭ krom la japana lingvo?

Kiu vivo estas pli bela? Ĉu la sola vivo aŭ la vivo en familio? ...
..... Kiu vivo estas pli bona? Ĉu la
sola vivo aŭ la vivo en familio, kie la familianoj ne amas unu la
alian? Kelkaj homoj diras:
“*La homo ne povas vivi sola.*” Ĉu ankaŭ vi pensas same?
..... Kion vi bezonas: monon en
bankoj aŭ amikojn en via ĉirkaŭaĵo?
..... Kiom da geamikoj vi havas, kiuj komprenas
vin kaj amas vin? Ĉu vi
bezonas iom da akvo?
Ĉu vi ĝojas, kiam vi ricevas malbonan novaĵon?
..... Kial vi ne skribas leteron al via
patrino ĉiu monate? Kiel
paroladis Jinsim kaj John pri la esperanto en la busana restora-
cio: Ĉu ridante, aŭ plorante?
..... Kia estas la bebo, kiu naskiĝis antaŭ kelkaj horoj?
..... Kion li faras en la tago? Ĉu li nur
dormas en la tuta tago?
..... Kion signifas, se la bebo ploras?
..... Kion manĝas la bebo kaj kiu
donas al li manĝaĵon?
..... Kion li trinkas?
..... Kiam komencas doni al li lia
patrino fruktojn kaj bibimbapon?

Hieraŭ vespere mi kune vespermanĝis kun viro kaj virino en gastejo kaj poste mi iris al mia ĉambro por dormi. Ankaŭ matene mi volis matenmanĝi kun ili, sed neniu el ili estis en la restoracio de la gastejo. Oni diris al mi, ke nokte la viro foriris kaj la virino forpasis. Kiu el ili mortis en la nokto?

..... Mi aŭdis, ke mia amiko estis senlaborulo antaŭe, sed en ĉi tiu monato li laboras en bona loko. Ĉu tiu novaĵo estas bona aŭ malbona?

..... Ĉu mia amiko nun ĝojas aŭ malĝojas?

..... Mi aŭdis, ke li nun povas labori, sed lia edzino malsaniĝis. Ĉu li nun estas feliĉa aŭ malfeliĉa? ..

..... Mi legis en gazeto, ke Kim Gyeongjae, mia unua instruisto en Jinju hieraŭ edziĝis. Kiam li estis fraŭlino? Ĉu antaŭ la geedzeco aŭ post la geedzeco?

..... Hajeong diris al mi, ke inter la gestudentoj de la Indramang Universitato Unil jam edziĝis, sed Maneog ankoraŭ ne. Kaj ŝi ankaŭ diris, ke Hanna jam edziniĝis, sed Soyeon ankoraŭ ne faris tion. Kiu el ili estas nun fraŭlo, fraŭlino, viro kaj virino?

..... Poste mi parolis pri tio kun Hanna kaj ŝi diris al mi, ke Hajeong ne bone sciis la aferon. Ĉar ŝi ankoraŭ ne edziniĝis, sed Maneog jam edziĝis antaŭ jaroj kaj li jam havas du filinojn. Kion signifas tio? Ĉu Hanna estas virino kaj Maneog estas fraŭlo?

..... Kiu diro estas vera: “Ĉiuj maljunuloj estas saĝaj.”, aŭ “Ĉiuj saĝuloj estas maljunaj.”?

..... Antaŭe mi studis japanan lingvon, geografion kaj historion en Nanzan Universitato, sed poste jam forpasis multaj jaroj. Kiam mi studis en Japanio? Ĉu antaŭ du jaroj? Ĉu mi studis ankaŭ matematikon en Japanio? Hanna estas unu el la plej bonaj studentinoj en mia klaso. Ŝi estas tre bela, tre bonkora kaj ŝi povas fari bongustan vespermanĝon. Pro tio mi pensas, ke ŝi baldaŭ bone edziniĝos. Kial mi pensas, ke ŝi povos baldaŭ bone edziniĝi? Ĉu mi pensas, ke ŝi jam estas preta por bona geedzeco? Pri kiuj homoj zorgas nun viaj gepatroj kaj pri kiuj ili zorgis, kiam vi estis infano? Ĉu vi zorgas pri via edzo kaj pri viaj infanoj? Ĉu ankaŭ pri viaj geavoj? Estas multaj infanoj sen gepatroj en Afriko. Kiu prizorgas ilin? Estas multaj infanoj sen gepatroj en Orient-Azio, pri kiuj bonkoraj homoj zorgas. Foje-foje mi donas monon al tiuj homoj. Ĉu vi pensas, ke tio estas bona afero kaj ankaŭ vi faras tion foje-foje? Mi esperas, ke Hanna baldaŭ bone edziniĝos kaj poste ŝi havos proprajn infanojn. Ĉu mi estas esperanto? Ĉu vi legis, ke ie en Azio aŭ Afriko la gepatroj geedzigas siajn gefilojn kiam ili estas ankoraŭ infanoj? Ĉu vi pensas, ke tio estas vera?

Mi legis interesajn proverbojn en la libro de Stano Marček. Unu tiuj proverboj diras, ke „*Pli bone zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino.*” Mi ne scias, ankaŭ en Koreio oni diras tion, aŭ ne. Sed Eŭropo multaj homoj konas tiun proverbon. Antaŭe en multaj eŭropaj familioj multaj infanoj, foje naŭ, dek, aŭ pli. Tio estis ofte en la vilaĝoj. Nun jam la eŭropaj familioj havas multajn infanojn, plej ofte estas nur unu, du, aŭ tri infanoj en la familio. Mi legis kaj aŭdis, ke ofte estis, ke la gepatroj havis tre vivon, kiam ili maljuniĝis. Ili ne havis monon iliaj gefiloj ne volis zorgi pri ili. La virinoj havis pli longan vivon, la viroj en Eŭropo. Pro tre ofte la patroj mortis antaŭe, kaj poste la patrinoj sole vivis. Sen mono ili estis kaj bezonis prizorgadon. Sed ne nur la de mono estis problemo. Alia problemo estis, ke en maljuneco tiuj virinoj tre ofte malfortiĝis kaj foje-foje malsaniĝis. Sen siaj familianoj malfacile povis vivi en vintro, kiam estis tre malvarme en Eŭropo. Ofte okazis, ke patrino havis multajn kiuj estis riĉaj kaj vivis en diversaj urboj kaj vilaĝoj. Ili riĉe vivis, ne donis monon al sia patrino. Estas interese, ke pro tio multaj ne malĝojiĝis. Ili ĝojis, ke siaj gefiloj vivis. Sed ili estis malĝojaj kaj malfeliĉaj, ili ne povis vidi tre ofte

siajn gefilojn kaj genepojn. La gefiloj kaj la genepoj malofte vizitis sian malriĉan patrinon, aŭ avinon kiu sole en malvarma dometo en malriĉa vilaĝo. Tiuj virinoj malĝoje pensadis ... sia juneco. Ili pensadis, kiam ili estis junaj, tiam homoj tre malriĉe vivis. Ili devis forte en la tuta tago por ke ili havu monon por la familio. Kaj ili manĝigis multajn infanojn patrina lakto, kiam la infanoj estis beboj. Tiam ili patrinan lakton kvinfoje aŭ sesfoje tage. Poste la beboj estiĝis unu jaraj kaj la patrinoj instruis ilin iri kaj kuri. Poste la infanoj povis promeni la ĉambro kaj povis kuri ĉirkaŭ la domo. Kiam ili du jaraj, tiam sia patrino komencis instrui ilin paroli. Multaj eŭropaj infanoj komencas kiam ili estas du jaraj. Nuntempe en multaj eŭropaj landoj la infanoj vizitas infanĝardenon, sed antaŭe ili ne tion. Antaŭe la gepatroj ludis siaj gefiloj kaj ili instruis la infanojn. Kaj ankaŭ infanoj instruis unu la alian kaj ludis unu kun la alia. Antaŭe en ĉiuj vilaĝoj multaj bestoj. Ili vivis en la korto aŭ en dometoj. La gepatroj matene komencis labori la kampoj kaj ili laboris tie ĝis vespero. Tiam ili hejmeniris, sed la infanoj estis la familia domo en la tuta tago. La plej junaj infanoj nur ludis en tago sed la pli maljunaj jam ankaŭ laboris iomete. Ili zorgis la plantoj kaj floroj en la ĝardeno kaj manĝigis la pli maljunajn familianojn. Sed ili manĝigis ne siajn familianojn. Ili ankaŭ multajn bestojn en la korto

kaj en la bestaj dometoj. En la vilaĝoj estis kokoj kaj kokinoj en ka kortoj kaj la kokinoj ovojn al la homoj. La infanoj manĝigis ilin foje tage, matene kaj vespere. Se estis ankaŭ kokidoj ... la korto, tiam la infanoj donis manĝaĵon al ili ses foje aŭ sesfoje tage kaj ili zorgis, ke la kokidoj ĉiam havu puran akvon trinki. Se la kokidoj malpuran akvon, tiam ili povis malsaniĝi. Antaŭe ... vilaĝaj familioj havis ankaŭ porkon aŭ porkojn en la korto, sed nun jam ne ĉiuj familioj havas tiajn bestojn. Tiuj vivis en malgrandaj bestaj domoj apud la familia domo. Kiam la gepatroj laboris en la kampoj, la infanoj manĝigis ankaŭ ilin. Oni donis manĝaĵon la porkoj du foje tage, matene kaj vespere. La pli junaj infanoj manĝigis la kokinojn kaj la kokidojn kaj la maljunaj donis manĝaĵon al la porkoj kaj al la porkidoj. Sed kiam la porkidoj estis tre junaj, tiam ili bezonis, ke la infanoj manĝigu ilin. Tiam sia patrino, la porkino manĝigis ilin porka patrina lakto. Kiam la infanoj ne devis labori hejme, tiam ili ludis unu la alia. Multaj infanoj ludis ludiloj, sed kelkaj infanoj ne havis ludilojn. Ili sen ludiloj. Ili ludis unu kun la alia kaj tre ofte ili ludis hundoj kaj katoj. Poste la infanoj vizitis lernejojn, geedziĝis kaj ankaŭ ili estiĝis gepatroj. Tion tiu proverbo por mi. Mi ne scias, nur eŭropaj, aŭ ankaŭ aziaj patrinoj havas la samajn malfacilaĵojn en sia vivo. Sed mi pensas, ke la patrinoj amas gefilojn ankaŭ en Afriko, Ameriko kaj Aŭstralio.

Kian filmon vidis vi hieraŭ en Seoul?

Ĉu vi vidas per viaj okuloj aŭ per via koro?

..... Mi legis, ke en kelkaj aziaj landoj la gepatroj edzinigas siajn filinojn. Kiel vi edziniĝis? Ĉu viaj gepatroj edzinigis vin?

Ĉu estas familioj en Koreio kie la gepatroj edzigas siajn gefilojn? Kio estas pli bona: se la gepatroj edzinigas siajn filinon aŭ se la filinoj serĉas kaj trovas edzon?

Kio estas pli bona: se la edzo estas pli juna, aŭ se li estas pli maljuna ol sia edzino?

..... Ĉu vi volus edziniĝi al riĉa viro aŭ al malriĉa viro?

..... Ĉu oni povas diri ion per siaj okuloj? Ĉu nur per sia buŝo?

Ĉu vi jam vidis homon, kiu multe parolis, sed diris nenion?

..... Ĉu mi bone pensas, ke homo, kiu aŭskultas, volas vidi ion?

Ĉu mi bone pensas, ke homo, kiu rigardas, volas paroli? Ni jam aŭdis la unuan parolon, sed mi ne scias, kiu parolos nun. Ĉu mi bone pensas, ke la homo, kiu rigardas, volas paroli?

..... Kion manĝas la tigroj: kokinon aŭ kokinaĵon?

..... Kion manĝas la homoj:
 kokinon aŭ kokinaĵon? Ĉu oni povas
 manĝi hundaĵon en koreaj restoracioj?
 Kion vi ŝatas pli bone? Ĉu porkaĵon aŭ ĉu bovaĵon?
 Ĉu estas vera, ke koreoj ne manĝas
 ĉevalaĵon kaj azenaĵon?
 Kion manĝas la araboj: ĉu porkaĵon aŭ ŝafaĵon?
 Kian vestaĵon havas vi somere kaj kian havas vi vintre?
 Ĉu mi bone pensas, ke
 en Afriko nur malmultaj homoj havas varmajn vestaĵojn?
 Kie estas laborejoj, kie tute ne estas
 skribaĵoj? Ĉu en oficejoj aŭ ĉu sur la kampoj?
 Ĉu mi bone pensas, ke la libroj estas legaĵoj
 sed la gazetoj ne estas, ĉar ili estas malgrandaj?
 Pro kio vi amas vian amikon?
 Ĉu ĉar li estas forta, bela kaj bonkora, aŭ ĉar li estas riĉa?
 Ĉu mi bone aŭdis, ke
 koreinoj ne ŝatas malfortajn virojn?
 Gyeongsim diris al mi, ke hieraŭ vi estis malsana.
 Ĉu estas tial, ke vi mankis hieraŭ en la klaso?
 Ĉu la koreaj viroj amas la belajn
 virinojn pro ilia beleco? Kiam
 donas via amiko florojn por vi?
 Kiu estis via unua instruistino?

Kial vi iras al via amiko en Jinju tiel ofte? Ĉu pro via longa amikeco? Ĉu pro la bongustaj kukaĵoj kiujn vi kune manĝas post agrabla babilado?Ĉu vi estas feliĉa kiam viaj dentoj doloras?
..... Mi aŭdis ke vi edziĝis al Gyeongjae. Ĉu vi faris tion pro lia bonkoreco aŭ pro lia forteco?
..... Vi estas tre bela. Ĉu mi bone pensas, ke multaj viroj amas vin pro via beleco?
..... Ĉu povas esti vera amikeco inter viro kaj virino? Kio estas en unueco: Ĉu forto? Ĉu malforto? Mi vidis homojn en Bangkok, kiuj vivis kun tigroj. Ĉu tiuj bestoj estis amikecaj aŭ malamikecaj?
Nun estas multaj homoj en Eŭropo kiuj kune vivas, sed ne geedziĝas. Kio estas ili? Ĉu gejunuloj? Ĉu geedzoj? Ĉu gekunuloj? Ĉu geamikoj? Kion signifas kunulino?
Kiu estas viaj kontraŭuloj? Ĉu viaj amikoj aŭ malamikoj?
..... Kio estas laborulo kaj kio estas senlaborulo?
Kie estas pli granda la senlaboreco: Ĉu en Japanio aŭ en Koreio? Kiel vivas la studentoj de la

Indramang Universitato? Ĉu ili vivas kun siaj gepatroj aŭ for de siaj gepatroj? Ĉu sen siaj gepatroj?

..... Hieraŭ mi iris al mia amiko tra la arbaro. Sed antaŭe mi trinkis iom da vino en trinkejo. Poste en la arbaro mi malpuriĝis, ĉar tie mi ludis kun multaj bestoj. Kiam mia amikino vidis, ke mi estis tre malpura, tiam ŝi diris al mi: "*Iru for!*" Kion signifas tio? Ĉu tio signifas, ke ŝi volis ke mi iru al la kuirejo por manĝi bibimbapon kun ŝi?

..... Kio estas for de Koreio? Ĉu Ĉinio? Ĉu Hungario?

Ĉu vi loĝas kun viaj gefratoj aŭ for de viaj gefratoj?

Kie loĝas viaj gefiloj? Ĉu ankoraŭ kun vi aŭ ili jam foriris?

..... Kiam mi alvenis al la Dong Seoul bus terminalo, tiam oni diris al mi ke mia aŭtobuso al la Silsangsa forveturis antaŭ kvin minutoj. Kion mi povis fari tiam?

..... Ĉu vi estus feliĉa, se vi havus flugmaŝinon?

Kiomfoje suĉas la beboj tage?

Ĉu ili suĉas bieron?

Ĉu mi bone scias, ke la koreaj beboj ne scias paroli koree, nek esperante?

Ĉu vi povas paroli kaj koree kaj esperante? Ĉu ankaŭ angle?

..... Kiam komencas iri kaj kiam komencas paroli la infanoj en Koreio?

..... Ĉu mi bone aŭdis, ke la koreaj

infanoj preskaŭ ĉiam ludas en la ĉambro kaj preskaŭ neniam lernas anglan lingvon hejme?
 Ĉu estas vera, ke preskaŭ ĉiuj koreaj infanoj iras al infanĝardeno kiam ili estas kvar jara-raj? Mi legis en gazeto, ke preskaŭ ĉiuj koreoj povas skribi kaj legi. Ĉu tio estas vera? Kial estas, ke multaj koreoj ne povas paroli nek skribi kaj legi en angla lingvo? Ili ĉiuj devis lerni tiun lingvon en multaj jaroj en la lernejoj, ĉu ne?
 Kiom ofte vizitadas vi la lernejon, kie vi lernas esperanton? Ĉu unufoje semajne, ĉu dufoje monate? Kiam komencas vizitadi la koreaj infanoj la unuan lernejon?
 Kiam finas ili vizitadi la universitaton? Kion ili ekfaras poste?
 Ĉu nur beboj suĉas patrinan lakton aŭ ankaŭ bestidoj faras la samon?
 Ĉu beboj povas trinki ankaŭ bovinan lakton foje-foje? Kiam komencas manĝi sole la infanoj? Park Gyeongsim estas bebo kaj Lee Gyeongsim estas maljunulino. Kies infaneco kaj juneco estas antaŭ si kaj kies infaneco kaj juneco estas for?
 Kiam estas infaneco? Ĉu antaŭ juneco aŭ post juneco?

Hieraŭ Gyeongsim diris al mi, ke antaŭ kelkaj tagoj ŝi veturis el Hamyang al Sasang per aŭtobuso kaj poste ŝi ekskursis en la arbaroj ĉirkaŭ Busan. Tie ŝi vidis, ke duopo kuŝis sub arbo kaj unu el ili estis amerika viro. La alia estis Jinsim, mia malnova amikino kaj ŝi ne havis vestojn. Mi ne komprenis, kiel tio estis. Pro tio mi diris al Jinsim, ke ŝi parolu al mi pri tiu afero. “*Estis tiel – komencis la rakonton mia amikino – ke mi kune lernis esperanton kun John en la tuta nokto kaj John tre ŝatis kiel mi instruis la lingvon al li. Poste li diris, ke li volis daŭrigi la lernadon. Li diris al mi, ke la plej bonaj instruistoj en Ameriko instruas ne per libroj, sed ili instruas lingvojn per rekta metodo en la naturo. Pro tio li diris, ke ni iru al la arbaro kaj mi instruu al li tie, kiel nomiĝas la arboj, la floroj, la plantoj kaj la bestoj en esperanto.*” Mi komencis kompreni la aferon, sed mi ne sciis, kial mia Jinsim estis sen vestoj. “*Estis tiel – rakontis mia amikino – ke John tre rapide lernis ĉiujn vortojn kaj post mallonga tempo li sciis, kiel la arboj, la floroj, la plantoj kaj la bestoj nomiĝas en esperanto. Estis tiel, ĉar la esperanto estas tre facila lingvo. Poste John volis lerni kiel la diversaj partoj de la homa korpo nomiĝas kaj pro tio mi devis senvestiĝi. Sed tio tute ne estis problemo, ĉar la suno bele brilis kaj estis tre varme en la arbaro.*” – finis sian parolon Jinsim. Nun mi ne scias, ĉu tiu historio estas vera aŭ ne. Ĉu vi pensas, ke mia

amikino vere amas min kaj ŝi amas ankaŭ esperanton?

..... Ĉu povas esti, ke ŝi estas ne nur bona esperantisto sed ankaŭ bona instruistino?

..... Ĉu estis pro tio, ke ŝi iris al la arbaro kun la amerika homo?

..... John diris, ke la plej bonaj instruistoj en Ameriko instruas lingvojn per rekta metodo. Ĉu

ankaŭ vi pensas, ke instrui lingvojn per rekta metodo estas inter-
resa kaj bona?

Kaj mi havas ankaŭ alian problemon. Kiam Gyeongsim parolis
al mi pri tiu afero, tiam ŝi parolis tre rapide. Pro tio mi ne bone
komprenis, kion ŝi vidis en la arbaro. Mi aŭdis nur, ke “*Jinsim-
estisenvestoj.*” Sed mi ne komprenis, ke ŝi volis diri, ke “*Jinsim
estis en vestoj.*” , aŭ “*Jinsim estis sen vestoj.*”

..... Ĉu vi pensas, ke John vere
interesiĝas pri esperanto? Aŭ ĉu li interesiĝas nur pri mia Jin-
sim? Kion vi pensas pri ĉi tiuj demandoj?

.....
.....
En Eŭropo infanoj ne povas geedziĝi. Ĉu ili povas geedziĝi en
Koreio? Ĉu vi scias,
kial nia internacia lingvo nomiĝas esperanto? Mi legis, ke D-ro
Ludoviko Lazaro Zamenhof faris tiun lingvon antaŭ 127 jaroj kaj
li havis la nomon D-ro Esperanto en sia unua lingvolibro. Ĉu vi
pensas, ke tiu historio estas vera?

..... Ĉu mi bone pensas, ke nia lingvo nomiĝas
esperanto pro tio? Ĉu
ankaŭ vi estas esperanto? Kion vi esperas?

.....
Soyeon ĉiam helpas al Hajeong fari ŝiajn hejmtaskojn, sed ŝi
neniam donas monon al mi. Kvankam ŝi bone scias, ke mi es-
tas malriĉa. Ĉu tio signifas, ke Soyeon ne estas helpe-ma?

Ĉu mia kato estas en la ĝardeno? Jes, ĝi estas en la ĝardeno.
..... Jes, estas. Multaj
bestoj vivas en la Jirisan.
..... Ne, vi malbone scias.
Jirisan ne nomiĝas “*Jiri templo*” en esperanto. ĝi nomiĝas “*Jiri
monto*”. Mi nomiĝas Lee
Gyeongnim. Mi
naskiĝis en Koreio. Mi naskiĝis
la 6-an de majo en 1985.
..... Vi malbone pensas. Mi neniam laboris en
la Fujisan kafejo.
Ĉar ŝi estas tre bonkora, belega kaj ŝi bone povas kuiru bibim-
bapon. Li povas
kuri rapide. Ili flugas super
la montoj. La instruisto
eniris la klasĉambron.
Al la Kyeonghee Daehak.
..... Ne ĉiutage, nur unufoje semajne.
..... Tio ne estas apud mi. Tio estas antaŭ
mi. Ne, ili ne
donas ovojn, ili donas lakton al la homoj.
..... Per la Hamyang Jirisan interurba

aŭtobuso. Je la kvara horo
kaj duono posttagmeze.
Ne ĉiuj birdoj. Nur kelkaj el ili povas flugi.
..... Ĉar ili ne havas flugilojn.
.....
Mi ne pensas, ke tio estis pro tio. Mi pensas, ke John diris al
Jinsim, ke ŝi senvestiĝu, ĉar li volis lerni kiel nomiĝas la partoj
de la homa korpo en esperanto.
..... La hundo povas kuri pli rapide.
..... Neniam.
..... Ie povas esti,
sed ne en la tuta Koreio.
Ĝi neniam estis korea urbo.
..... Nur en malgrandaj vilaĝoj.
..... Ĉie en Seoul.
..... Kelkaj dormas sur la arboj, kelkaj sub la arboj.
..... Tagmeze mi
povas vidi ĝin, sed nokte neniam.
..... Tio neniam estis blua.
..... Ili ne estas dolĉaj,
ĉar ili ankoraŭ ne maturiĝis.
Nur en la zoologiaj ĝardenoj.
..... En neniuj zoologiaj ĝardenoj,
ĉar tiuj bestoj jam ne vivas.

..... Tiam oni povas vidi la sunon en Ameriko. La plej granda en Afriko. Tridek minutoj. Antaŭ mia geedzeco mi havis, sed nun mi jam ne havas.

..... Ĉar ili estas senlaboruloj.

..... Mi ne povas diri tion al ŝi, ĉar ŝi forpasis antaŭ du jaroj.

.....

Vi malbone scias. Ŝi ne estis sen vestoj en sia hejmo, ŝi estis sen vestoj nur en la arbaro.

..... Ĉar la suno bele brilis kaj estis varme en la arbaro.

..... Tiam oni ne ekdormas, tiam oni vekiĝas en Koreio.

..... Ne nur en la Indramang Universitato, sed ankaŭ en Mapo, en Seoul.

..... Mi pensas, ke vi malbone scias. Tokyo neniam estis afrika urbo.

..... Tokyo estas pli granda.

.....

Tio ne estas vera. La Hangang estas korea rivero.

..... La Nanzan estas en japana urbo Nagoya kaj la Namsan estas en Koreio en Seoul kaj en Busan.

Hieraŭ mi vidis belegan koreinon en busana autobus-terminalo. Mi scias, ke ŝia nomo estas Gyeongsim, sed mi ne scias, kie mi vidis ŝin. Ĉu vi scias, ke tio estis en Nopo aŭ en Sasang?

..... Kaj mi scias, ke en aprilo mi trinkis kafon kun tiu belulino ie, sed mi ne scias, kie. Ĉu vi scias, ke tio estis en la Himalaya Kafejo aŭ en la Fujisan Kafejo?

..... Jinsim diris, ke tute ne estis problemo, ke ŝi senvestiĝis en la arbaro, ĉar la suno bele brilis, kaj estis varme en la arbaro. Kvankam ŝi diris tion, ĉu vi ne pensas, ke tamen povus esti problemoj? Ĉu vi ne pensas, ke kvankam la suno brilas, kaj pro tio estas varme apud la arboj, tamen povus esti malvarme sub arbo?

..... En Eŭropo kelkaj homoj estas riĉaj, sed multaj estas malriĉaj. Kaj multaj estas feliĉaj kaj kelkaj estas malfeliĉaj. Ĉu tio montras, ke kvankam multaj homoj havas multe da mono, tamen ili ne ĉiam estas feliĉaj?

Ĉu ti estas same ankaŭ en Koreio, aŭ ĉi tie tio estas malsame?

..... Hieraŭ Hanna diris al mi, ke kvankam ŝi aŭskultis en la klasĉambro, tamen ŝi aŭdis nenion. Pro kio tio estis? Ĉu ĉiuj homoj silentis, aŭ ĉiuj homoj parolis en la ĉambro en la sama tempo?

..... Aŭ ĉu povas esti ke la oreloj de Hanna malsaniĝis?

Kiam estas, ke

kvankam oni rigardas, tamen oni vidas nenion? Ĉu en lumo, ĉu en mallumo? Ĉu tage, ĉu nokte?

..... Ĉu vi jam legis novaĵon pri koreo, kiu kvankam estis juna, tamen li estis saĝa? Kiu li estis?

..... Ĉu vi jam vidis homon, kiu kvankam estis maljuna, tamen li estis stulta?

..... Ĉu vi emas diri al mi la nomon de tiu stultulo? (Se vi estas saĝa, tiam vi ne emas, mi pensas.)

..... Kial vi ne emas diri al mi la nomon de tiu stultulo?

Kelkaj homoj laboras en la ĝardenoj kaj aliaj trinkas en la trinkejo en la labortagoj. Kiuj el ili estas laboremaj kaj kiuj estas trinkemaj?

Kion faras la studemaj studentoj de nia universitato? Ĉu ili bone studas kaj faras ĉiujn hejmtaskojn aŭ ĉu ili rigardas filmojn en televidiloj en la tuta tago?

Kial ne promenas timemaj homoj nokte en la arbaroj?

..... Ĉu vi estas timemulo?

..... Mi legis, ke kelkaj birdoj timas, ke pli grandaj birdoj volas ilin manĝi por tagmanĝo. Ĉu mi bone pensas, ke ankaŭ tiuj birdoj estas timemuloj?

..... Kiuj homoj estas dormemaj? Ĉu kiuj multe dormis antaŭe, aŭ kiuj ne povis sufiĉe dormi en la nokto?

Kiam mi estas en aliaj urboj, tiam mi ŝatas tranokti en malkaraj gastejoj kaj mi emas kuiri en la gastejaj kuirejoj. Sed mia filo ĉiam tranoktas en karaj gastejoj kaj li ŝatas manĝi en karaj restoracioj. Kion montras tio?

..... Ĉu vi ŝatas ŝpari monon, aŭ vi ŝatas aĉeti ĉion, kion vi vidas en la magazeno?

..... Multaj homoj vivas kaj laboras en la Silsangsa. Kion vi pensas: Ĉu ili estas ŝparemaj aŭ malŝparemaj?

..... Ĉu oni povas diri, ke ili estas ŝparemuloj?

Kiam vi timas? Ĉu kiam vi estas sole en arbaro, aŭ kiam vi estas kune kun malamiko en malluma arbaro?

..... Hanna diris al mi, ke en 2015 ŝi eble edziniĝos. Ĉu tio signifas, ke en 2016 ŝi havos edzon?

..... Ĉu eblas labori ie en la Jirisan kaj ankaŭ lerni esperanton samtempe en la Indramang Universitato?

..... Ĉu estas ebleco lerni ankaŭ anglan lingvon en tiu universitato?

..... Mi legis, ke ne veturas trajnoj inter Dong Seoul kaj Hamyang. Kiel eblas veturi el Gangbyeon al la Jirisan?

..... Kiu lingvo estas la plej facile lernebla? Ĉu esperanto aŭ la angla lingvo? Ĉu la ĉi-

na? Kiu el tiuj lingvoj estas la plej malfacila? Kiam estas pli facile legebla la gazeto: en lumo aŭ en mallumo? Kio estas manĝebla: la kokaĵo aŭ la musaĵo? Ĉu la kimĉio estas manĝebla por la katoj? Ĉu la bongusta ruĝa vino estas trinkebla por la beboj? Kial ne? Ĉar ĝi ne estas sufiĉe dolĉa? Ĉu hungarlingva letero estas legebla kaj la hungarlingva parolado estas komprenebla por vi? Kial ne? Brila kaj ŝia edzo estas miaj malnovaj geamikoj en Seoul. Hieraŭ mi demandis ŝin: “*Ĉu vi kaj via edzo volas veturi kun mi al Ameriko por ĉeesti ekskurson?*” Ŝi respondis: “*Kompreneble.*” Kion signifas tio? Ĉu ili volas veturi kun mi, aŭ ne volas? Je la oka horo kaj duono vespere mi demandis miajn studentojn: “*Ĉu ni finu nun la lecionon?*” Ili respondis unu post la alia: “*Kompreneble.*” Ĉu tio signifas, ke ili ankoraŭ volis studi en la klasĉambro iomete? Kelkaj homoj el miaj geamikoj ne kredas, ke mia Jinsim senvestiĝis en la arbaro. Kvankam Gyeongsim diris al mi tion. Ĉu vi kredas tiun historion? Miaj aliaj geamikoj kredas, ke ŝi eble senvestiĝis. Sed ili pensas, ke ŝi faris tion, ĉar ŝi ne amas min kaj ŝi volas edziniĝi al John. Ĉu vi

pensas, ke tio estas kredebla?

Kia estas la vitro en via fenestro? Ĉu travidebla? Ĉu netravidebla?

Kiam estas la vitro pli travidebla?

Kiam ĝi estas pura, aŭ kiam ĝi estas malpura?

..... Kiel vi povas pli facile legi? Ĉu kun okulvitroj aŭ sen okulvitroj?

Ĉu eblas manĝi en la Silsangsa manĝejo nokte?

Ĉu eblas kuiru en la Indramang kuirejo nokte?

Ĉu mi bone pensas, ke la mono estas manĝebla?

..... Kiel estis, ke mi havis unu mil wonojn sub la lito en mia ĉambro kaj post kelkaj semajnoj mi vidis, ke musoj manĝis duonon de la mono?

..... Ĉu mi bone pensas, ke kvankam la mono ne estas manĝebla, sed por ĝi mi povas aĉeti manĝeblajn aĵojn en la magazeno?

Ĉu mi bone pensas, ke la manĝeblaj aĵoj estas manĝaĵoj kaj la trinkeblaj aĵoj estas trinkaĵoj?

Kiuj estas la plej bonaj fruktoj en Koreio?

..... Ĉu mi bone aŭdis, ke la freŝa mesilfrukto estas dolĉa kaj manĝebla?

..... Maneog diris al mi en aprilo: “*Revenu en septembro!*” Kion signifas tio? Ĉu li volos vidi min en septembro en la Indramang Universitato, aŭ li volos, ke mi estu en Eŭropo tiam?

Kion faras la koreaj virinoj kiam sia edzo diras al ili “*Vi estas malbela.*”? Koreaj edzoj neniam diras tion al sia edzino. Kion vi faras , kiam oni diras al vi en la Dong Seoul Bus Terminalo, ke via aŭtobuso antaŭ kvin minutoj forveturis?

..... Kion vi faras, kiam via gasto diras al vi: “*Donu al mi kukon denove!*”?

Ĉu tio signifas, ke via gasto ne ŝatas vian kukon?

..... Kio estas kuko kaj kio estas koko?

..... Kion vi povas diri, se vi volas havi pli da akvo? Ĉu vi povas diri: “*Donu al mi glason da akvo refoje!*”, aŭ “*Donu al mi glason da akvo ankoraŭfoje!*”? Aŭ ĉu vi povas diri ambaŭ?

Kio estas pli bona? Se oni diras: “*Sidiĝu!*”, aŭ se oni diras “*Bonvolu sidiĝi!*”?

Ĉu “*Bonvolu sidiĝi!*” signifas, ke vi volu fari bonan kaj sidiĝu?

..... Kiu diro estas pli bona? “*Pagu nun!*”, aŭ “*Bonvolu pagi nun!*”?

Hieraŭ mi vizitis Jinsim, mian malnovan amikino en Dong Daegu. Ni manĝis bibimbapon en bona restoracio kaj poste ŝi diris al mi: “*Bonvolu reveni kaj mi volas vin revidi baldaŭ. Ĝis revido!*” Ĉu tio signifas, ke ŝi ne volas vidi min denove?

..... Kion vi povas skribi al via amiko je

la fino de via letero? Ĉu “*ĝis revido!*”, aŭ “*ĝis reskribo!*”?

..... Ĉu vi jam pruntis libron al via amiko?

..... Kion devos fari via amiko, kiam vi pruntas libron al li? Ĉu li devos redoni al vi la saman libron, aŭ ĉu li devos doni al vi alian libron?

Kion devos fari via amiko, kiam vi pruntas monon al li? Ĉu li devos redoni al vi la saman monon, aŭ ĉu li devos doni al vi alian monon en la sama valoro?

Kion vi devos fari, kiam vi ricevas monon de banko? Ĉu vi devos redoni la saman monon, aŭ ĉu vi devos redoni pli da mono, ol kiun vi ricevis?

Nun estas fino de studtempo en la universitato kaj venos unusemajna libertempo. Kiam vi devos reiri al via universitato: post sep tagoj aŭ post tri tagoj lunde matene?

Ĉu jam estis iam, ke vi relegis la saman libron dufoje? Kial vi faris tion?

Ĉu bona aŭ malbona lernanto devas dufoje viziti la saman klason en sia lernejo?

Hieraŭ vi faris vian hejmtaskon, sed multaj eraroj estis en ĝi. Kion vi faros? Ĉu vi refaros la hejmtaskon dufoje aŭ trifoje?

..... Al kiu lokoj vi ŝatus reiri multfoje? Ĉu al belaj, agrablaj lokoj, aŭ ĉu al malbelaj kaj malagrablaj lokoj?

Ĉu vi jam estis en restoracio, kie vi diris, ke vi neniam reiros tien? Se

estis, kial vi diris tion?

..... Ĉu katidoj estas ludemaj?

..... Kiom kostas unu kilogramo da piro en via urbo kaj kiom ĝi kostas en Jagalchi?

..... Kiam disiras la studentoj de la Indramang Universitato? Ĉu antaŭ la lecionoj, aŭ post la fino de la lecionoj?

..... Kion faras tiuj studentoj je la komenco de la unua leciono? Ĉu ili ekmanĝas?

Kion faras la instruisto, kiam li disdonas la hejmtaskojn? Ĉu li donas ĉiujn hejmtaskojn al Soyeon, aŭ ĉu li donas hejmtaskon al ĉiuj studentoj?

Kion faros Hanna, kiam Gabor petas ŝin ke ŝi disdonu la hejmtaskojn?

Je la komenco de la studjaro Maneog disdonis la Esperanto librojn. Kion signifas tio? Ĉu li donis ĉiujn librojn al Gabor?

..... Kiam disflugas la birdoj en Koreio? Ĉu en printempo, ĉu en aŭtuno?

..... Kiam Soyeon havis naskiĝtagon, tiam ŝi disdonis ĉokoladojn kaj bombonojn. Ĉu mi bone pensas, ke tio signifas, ke ŝi ricevis multe da ĉokolado kaj bombono tiam?

Kiuj homoj donas monon al la malriĉuloj? Ĉu la helpemaj, aŭ la malhelpemaj?

Kia infano estis vi en via infaneco? Ĉu ludema, ĉu lernema?

Mi scias, ke Gyeongsim faras panon en sia laborejo sed mi ne scias, ĉi ŝi ankaŭ distranĉas la panon aŭ alia persono faras tiun laboron. Kion vi pensas pri tio?

..... Ĉu mi bone pensas, ke Inae neniam distranĉis kafon en la Himalaya Kafejo, ĉar kafon ne eblas distranĉi?

..... Sed ĉu povis esti, ke iam ŝi distranĉis kokon aŭ kukon tie?

Kion disportas la leterportistoj en Koreio?

En Hungario la leterportistoj disportas ne nur leterojn sed ankaŭ monon. Ĉu estas tio same ankaŭ en Koreio?

..... Kiam multaj homoj estas en la sama loko kaj ili malamikece paroladas, tiam policisto diras, ke “*Homoj, disiĝu!*”. Ĉu tio signifas, ke la policisto volas, ke ĉiuj homoj iru al la policejo? Aŭ ĉu li volas, ke la homoj iru al diversaj lokoj?

..... Ĉu vi jam petis vian patrinon, ke ŝi aĉetu ĉokoladon por vi?

Kie oni vendas ĉokoladon en Koreio? Ĉu en preĝejoj? Ĉu en vendejoj? Ĉu en magazenoj?

Kie estas pli bone aĉeti fruktojn kaj viandon en Koreio, se oni volas ŝpari monon? Ĉu en grandaj magazenoj aŭ en la stratoj de Jagalchi?

..... Ĉu mi bone pensas, ke eŭropaj homoj aĉetas pli da lakto, butero kaj

fromaĝo, ol koreoj?
 Ĉu eŭropanoj aŭ azianoj ŝatas manĝi panon?
 Ĉu mi bone scias, ke eŭropanoj ŝatas panon ĉar la fino de
 “*eŭropano*” estas “*pano*”?
 Ĉu mi bone scias, ke eŭropanoj pagas per eŭro ĉar la komenco
 de “*eŭropano*” estas “*eŭro*”?
 Kie renkontis John mian malnovan amikilon: en Jagalchi aŭ en
 Jinju? Kiom ofte renkontas
 vi viajn geamikojn? Ĉu viaj sam-
 klasanoj en via lernejo renkontiĝas foje-foje?
 Mi scias, ke vi ne vidis vian malnovan amikon en kvin jaroj. Sed
 mi aŭdis, ke vi renkontis lin hieraŭ. Kion do vi faris?
 Ĉu vi serĉas vian libron sub la lito kiam vi ne
 scias, kie ĝi estas? Kie vi serĉas vian
 plumon, kiam vi ne povas skribi leteron sen pluvo? Ĉu en la
 kuirejo? Ĉu en la dormĉambro?
 Ĉu jam estis iam, ke vi ne sciis kie viaj okulvitroj estis?
 Kiam vi ŝercas? Ĉu kiam vi estas inter geamikoj,
 aŭ kiam vi estas inter malamikoj?
 Kiel instruas Gabor? Ĉu per
 ŝercoj aŭ per serĉoj? Kiel oni
 aĉetas en la koreaj vendejoj? Ĉu kun aĉetkorboj aŭ sen
 aĉetkorboj? Kiel koreoj aĉetas
 en la stratoj de Jagalchi?

Kion vi faras, kiam vi serĉas vian katinon en via domo, sed vi trovas ŝin nenie? Ĉu vi serĉas ŝin poste ankaŭ en la ĝardeno kaj en la ĉirkaŭaĵo de via domo?

Ĉu povas esti en Koreio, ke vi ne trovas vian hundon, ĉar aliaj homoj mortigis lin, kaj poste tranĉis, kuiris kaj manĝis la hundajn?

Kion ŝatas manĝi koreoj: Ĉu kokinon aŭ kokinaĵon?

..... Kio estas pli bongusta: kokaĵo aŭ kokinaĵo?

..... Ĉu jam estis iam en via vivo, ke vi prenis kokaĵon dufoje, ĉar tio estis tiel bongusta?

Ĉu ĉiuj aĉetantoj devas preni aĉetkorbon en la koreaj vendejoj?

..... Ĉu oni devas preni aŭ ĉu oni povas preni aĉetkorbon antaŭ la aĉetado?

Kion vi faras, kiam vi volas aĉeti ion, sed vi ne havas sufiĉe da mono?

..... Ĉu vi povas rememori ĉiujn homojn, kiujn vi vidis en via vivo?

Minmin ĉiam helpas min, kiam mi estas en Seoul. Gyeongnim kelkfoje helpas, sed Kim Gisook neniam, ĉar ŝi neniam havas tempon por mi. Kiu el ili estas la plej helpema kaj kiu estas la plej malhelpema?

Kiaj homoj estiĝas riĉuloj? Ĉu la ŝparemaj aŭ la malŝparemaj?

Kiom da gefratoj vi havas kaj kiuj ili estas?

Ĉu vi povas rememori ĉiujn homojn, kiuj kisis vin?

..... Ĉu vi ĉiam rememoros min?

..... Ĉu vi povas rememori ĉiujn bonajn filmojn, kiujn vi vidis en via vivo?

..... Ĉu vi rememoras, ke ni havis ĝojigan tempon kune en Iksan antaŭ du jaroj?

..... Ĉu vi ĉeestos la Esperanto Renkontiĝon en Iksan ankaŭ en 2015?

Kiel vi rememoras? Ĉu ni havas sukeron hejme, aŭ ĉu ni devos aĉeti ankaŭ sukero en la vendejo?

Kiom kostas unu kilogramo da sukero en Koreio?

Kie estas la sukero pli multekosta? En Eŭropo aŭ en Koreio? ...

..... Kie estas la viando pli malkara: en Japanio aŭ en Ĉinio?

..... Kie estas ĉambro en gastejo pli malkara? Ĉu en Gangnam aŭ en Wangsimni?

..... Kiam devas la gastoj pagi en la koreaj gastejoj? Ĉu antaŭ la tranoktado aŭ post la tranoktado?

..... Kion vi faras, kiam vi ne havas sufiĉe da mono por aĉeti flugmaŝinon? Ĉu vi diras al Minmin: “*Bonvolu pruntedoni al mi monon por ke mi povu aĉeti flugmaŝinon!*”? Aŭ ĉu vi aĉetos flugmaŝinon poste, kiam vi havos sufiĉe da mono por fari tion?

Kiu helpis vin aĉeti dolĉaĵon kiam vi estis kvin jara?

..... Estas kelkaj homoj, kiuj ne povas vidi pro okulmalsanoj. Ĉu koreoj helpas tiujn homojn por trairi stratojn?

..... Kiu helpas vin lerni esperanton, kiam vi ne povas viziti klasojn pro via laboro?

..... Ĉu koreaj fraŭlinoj serĉas bonajn junulojn por edziniĝi longe, aŭ ili faras tion nur mallonge?

..... Ĉu koreaj gepatroj serĉas afablajn junulojn por edzinigi siajn filinojn aŭ la filinoj pli bone ŝatas mem trovi bonan edzon?

..... Mi vidas, ke koreino aĉetas bieron kaj lakton. Kiun el tiuj trinkaĵoj aĉetas ŝi por sia edzo kaj kiun al sia infano?

..... Estas diversaj viroj en Koreio. Viro povas esti helpema, forta, malĉarma, ŝparema, mallaborema, instruema, lernema, saĝa, neniam timema, maljuna, malalta, ŝercema, ĉiam ĝoja, dormema, stulteta, malofte ploranta, malriĉa, parolema, ĉiam ridanta, malzorgema, bona, malbela kaj silentema. Kion vi ŝatus, kia estu via kunulo?

..... Kio vi volas esti post la fino de la universitato? Ĉu vendistino aŭ senlaborulino? Aŭ instruitino?

..... Kion vi faras, kiam vi ne povas aĉeti prunojn en via vendejo? Ĉu vi iras al la apuda vendejo por serĉi prunojn, aŭ ĉu vi aĉetas pirojn aŭ pomojn por la vespermanĝo?

En kiu parto de Seŭlo troviĝas bonaj restoracioj?

..... Ĉu ili estas tre karaj?

Ĉu aĉetblas alkoholaĵoj en ĉiuj vendejoj?

..... Ĉu ĉiuj koreaj vendistinoj estas afablaj kaj ĉarmaj?

..... Kiu estas pli afablaj: la junaj aŭ la maljunaj?

..... Ĉu estis iam, ke vi iris al vendejo por aĉeti ion, sed en la vendejo vi forgesis, kion vi volis aĉeti?

..... Kion vi faris tiam?

..... Ĉu estis iam, ke vi forgesis pagi en restoracio?

..... Kiom vi pagas, kiam vi aĉetas tri pomojn, se unu pomo kostas sescent wonoj?

..... Kiom da mono vi ricevas, se vi donas dumil wonojn al la vendistino?

Vi vidas, ke bongusta manĝaĵo aĉetblas en bona restoracio por dek du mil wonoj. Kion vi faras, se vi estas malsatega, sed vi havas nur dek unu mil wonojn?

..... Mi aŭdis, ke hieraŭ vespere vi kune manĝis kun viaj geamikoj. Kiam vi disiris? Ĉu antaŭ la manĝo aŭ post la manĝo?

Kaj Inae kaj Gyeongsim havas sufiĉe da dolĉaĵo hejme, sed ili vidis pli novajn en malgranda magazeno en Jagalchi. Inae aĉetis iom da novaj dolĉaĵoj, sed Gyeongsim ne faris tion. Kiu el ili estas ŝparema kaj kiu estas malŝparema?

.....

Jinsim rakontis al mi, ke ŝi renkontis amerikan homon en Jagalchi . Tiam la viro diris al ŝi, ke ŝi estas tre bela. Kion faris tiam Jinsim? Ĉu ĝojis? Ĉu malĝojis? Poste ili iris al restoracio kaj post la vespermanĝo ili iris al ŝia hejmo por rigardi interesan Esperanto libron. Sed tie Jinsim ankoraŭ ne senvestiĝis, ĉar tiam ili nur libron legis en la nokto. Ŝi senvestiĝis nur en la arbaro, kiam John petis, ke ŝi instruu al li la homajn korpopartojn per rekta metodo. Ĉu mi bone pensas, ke John diris al Jinsim, ke ŝi estas bela, ĉar li rigardis ŝiajn okulojn, orelojn, nazon, buŝon kaj vizaĝon en Jagalchi kaj vidis, ke ili estas belaj? Ĉu mi bone pensas, ke John tiam ankoraŭ ne vidis ŝian frunton, mentonon kaj ŝiajn du vangojn ĉar ili estis sub ŝia vestaĵo? Kie vidis li ŝian ventron, dorson kaj ŝiajn brustojn? Kial? Ĉu mi bone pensas, ke kvankam Jinsim senvestiĝis, tamen John neniam povis vidi ŝian koron, ĉar tio estas en la korpo kaj tio ne videblas? Ĉu povas esti, ke kvankam li ne vidis ŝian koron, sed tamen povis aŭdi ĝin iomete? Kiel tio povas esti? Ĉu povas esti, ke li vidis ŝiajn manojn, piedojn, fingrojn kaj ŝian kolon jam en la loĝejo? Kie montris Jinsim sian trunkon al John? Ĉu John vidis la krurojn

de Jinsim jam en la strato, aŭ nur en la arbaro?

..... Jinsim diris al mi, ke John lernis tre rapide kiel nomiĝas la arboj, la plantoj, la floroj kaj la bestoj en esperanto, sed li lernis tre malrapide kiel nomiĝas la homaj korpopartoj. Ĉu vi pensas, ke estas tiel, ĉar homo havas tre multajn korpopartojn kaj pro tio malfacile estas lerni ĉiujn en mallonga tempo?

..... Kiom da membroj estas sur la trunko kaj kiuj ili estas?

..... Kvankam sur la 83-a paĝo de la Esperanto libro oni desegnis bildon pri la homa korpo, tamen John ne volis lerni la korpopartojn per tiu bildo. Kion vi pensas, kial volis li lerni ilin en la naturo? Ĉu la kvalito de tiu desegno ne estas sufiĉe alta?

..... Ĉu ĉiuj homoj skribas per maldekstra mano? Per kiu mano vi skribas? Per kiu piedo vi iras?

..... Kiom da fruntoj vi havas?

..... Ĉu estas vera, ke saĝuloj havas longan frunton sed stultuloj mallongan? Per kio finiĝas brako kaj per kio finiĝas kruro?

..... En kiu flanko havas vi vian koron? Ĉu la homa koro estas aŭdebla aŭ videbla? Ĉu mi bone pensas,

ke la homaj okuloj estas videblaj, ĉar la homoj vidas per okuloj?

.....
Mia Jinsim neniam kolorigis sian hararon. Kiaj do estas siaj haroj? Kion faras ni per nia kapo, per

niaj okuloj, per niaj oreloj, per nia buŝo, per nia nazo, per niaj kruroj, per niaj fingroj kaj per nia koro?

.....
Kion vi pensas: Ĉu mia Jinsim estas bonkorulino aŭ malbonkorulino?

Ĉu estas vera, ke kelkaj homoj povas spiri ne nur per sia nazo sed ankaŭ per sia buŝo?

..... Ĉu estas vera, ke kelkaj homoj povas kanti ne nur per sia buŝo sed ankaŭ per sia nazo?

..... Estas du diroj: “*Homo povas veturi per buŝo.*” kaj “*Homo povas kanti per buso.*” Kiu el ili estas bona?

Mi scias, ke mia Jinsim ĉiam havas okulvitrojn antaŭ siaj okuloj.

Ĉu mi bone pensas, ke John ne povis vidi kiaj koloraj estas la okuloj de mia amikino, ĉar la okulvitroj ne estas travideblaj?

Aŭ ĉu povas esti, ke John petis ŝin en la arbaro, ke ŝi ne nur senvestiĝu sed ankaŭ senokulvitiĝu?

Kian koloran havas viaj okuloj kaj kian koloron havas via hararo?

Ĉu via hararo estas natura aŭ kolorigita.?

Kie estas via lango kaj kion vi faras per ĝi?

..... Kiom da ĉefaj partoj havas la homa korpo kaj kiuj estas ili?

En la lastaj semajnoj kelkaj homoj diris al mi, ke povas esti, ke Jinŝim ne estas mia vera bona amikino. Ili pensas tiel, ĉar ŝi estas tre ofte kun amerika viro. Sed Jinsim ĉiam diris al mi, ke ŝi min amas kaj ŝi nur esperanton instruas al la amerika homo. Miaj kelkaj geamikoj ne kredis tion kaj diris al mi, ke mi lasu tiun virinon kaj ne plu pensadu pri ŝi. Mi ne sciis, kion mi faru. Poste bona penso venis al mi en la kapon. Mi havas malnovan bonan amikon en Seoul, kiu bone instruas esperanton en pli ol dudek jaroj. Mi pensis, ke mi iras al li al Myeongdong kaj tie mi parolas al li pri mia amikino. Mi volis rakonti, ke ankaŭ ŝi instruas esperanton en Busan. Poste mi faris tion, sed mi iris al Myeongdong ne nur pro tio. Mi sciis, ke mia amiko estas saĝa korea viro kaj mi pensis, ke koreaj viroj pli bone komprenas kiel virinoj pensas, ol mi. Mi volis aŭdi kion mia amiko pensas pri mia histrio kun Jinsim. Mi rakontis la aferon al li kaj poste li diris: *“Kion via Jinsim faris en Busan, tio estis skandalo. Ĉiu korea viro povus kompreni en duon minuto, ke tiu virino ne amas vin. Pro tio mi diras al vi, ke vi lasu ŝin kaj vi ne plu pensadu pri ŝi.”* – finis sian parolon mia myeongdonga amiko. Mi bone aŭdis tion sed nun mi ne scias, kion mi faru. Mi ne scias, kial li diris, ke mia Jinsim faris skandalon en Busan. Ĉu mi bone pensas, ke tio signifas, ke instrui esperanton en Busan estas skandalo, ĉar en Koreio oni povas instrui esperanton nur en Seoul kaj en la Jirisan?

.....
Aŭ ĉu li pensis, ke mia Jinŝim faris skandalon, kiam ŝi instruis la lingvon per amerika rekta metodo?

..... Ĉu povas esti, ke ankaŭ en Ameriko oni ne instruas lingvojn tiel?

Ĉu povas esti, ke John parolis pri tio al ŝi, nur ĉar li volis vidi, ke mia amikino estas tre bela?

Kaj mi ne komprenas kion signifas duopo kaj duono.

..... Ĉu mi bone pensas, ke ĉiu korea homo pensus ke mia Jinsim ne amas min, sed post dumnuta pensado ili komprenus, ke tio ne estas vera kaj Jinsim estas mia vera bona amikino?

..... Kaj kial diris mia amiko al mi, ke mi lasu tiun virinon kaj ne plu pensadu pri ŝi? Ĉu li vere kredas, ke Jinsim ne amas min?

Aŭ ĉu li diris tion al mi, ĉar li bone scias, ke mia Jinsim estas tre bela kaj li volus amikiĝi kun ŝi?

..... Estas multaj demandoj kaj mi ne scias la respondojn. Kion vi pensas pri ĉi tiuj demandoj?

..... Ĉu mi bone pensas, ke la homo, kiu instruas, estas lernanto, kaj la homo, kiu lernas, estas instruisto?

..... Kio estas laboranto kaj kio estas helpanto? Hajeong nun sidas kaj faras hejmtaskon. Ĉu mi bone pensas, ke ŝi estas hejmtaskon faranta studentino, kiu sidante lernas?

..... Soyeon laboras en la universitata ĝardeno kaj samtempe ŝi kantas. Kia studentino estas ŝi kaj kiel ŝi laboras?

..... Kiu el tiuj studentinoj estas lernantino kaj kiu el ili estas laborantino?

Kion signifas la piron manĝanta virino kaj kion signifas la man-
ĝata piro? Kiaj
homoj sidas en la pulgoki restoracio en Mapo kaj kiaj estas la
pulgokioj tie? Ĉu
doenjang estas via plej ŝatata manĝaĵo?
Kio estas konato? Kio
estas konatulo? Kio
estas kunulo kaj kio estas kunulino?
..... Ĉu vi havas kunulon aŭ ĉu vi ŝatus
havi kunulon? Kiu manĝaĵoj estas viaj
tri plej ŝatataj manĝaĵoj kaj kio estas viaj ŝatataj trinkaĵoj?
..... Gisuk nun
lavas sian filon. Kia estas nun Gisuk kaj kia estas sia filo?
..... Ĉu vi ŝatas legi gazeton
en agrabla kafejo tinkante bongustan kafon kun sukero?
..... Kiam vi ŝtas fari tion? Ĉu kiam vi estas
sata? Hanna estas bela, bonkora
kaj helpema studentino en la Indramang Universitato. Pro tio mi
esperas, ke ŝi baldaŭ bone edziniĝos post la fino de sia studado
en la universitato. Ĉu mi bone pensas, ke la frato de ŝia edzo
estos ŝia bopatro? Kiu estos
ŝia bopatrino kaj kiu estos ŝia bofratino?

..... Kiuj estos ŝia bofilo kaj ŝia bofilino?

Ĉu ŝi estos la bofilo de la patro de sia edzo?

..... Kies bofilino ŝi estos?

..... Ĉu mi bone pensas, ke la estro kaj la ĉefo estas la samo? Kiu estas la estro de la Indramang Universitato?

Kio estas urbestro kaj kio estas lernejestro?

..... Kiu estas la urbestro en via urbo?

..... Mi vidis, ke estas granda vagonara stacidomo en Seoul. Ĉu mi bone pensas, ke tie laboras staci-estro kaj li estas la ĉefo de la stacidomo?

..... Kiu urbo estas la korea ĉefurbo kaj kiu estas la urbestro tie?

..... Ĉu mi bone scias, ke direktoro de lernejo estas lernejestro? Kio estas direktoro de laborejo? Kiu estas la ŝtatestro de Koreio? Ĉu mi bone scias, ke en kelkaj ŝipoj ne estas ŝipestro?

..... Ĉu mi bone pensas, ke en la koreaj ŝipoj ĉiuj homoj ĉiam devas fari, kion la ŝipestro diras?

..... Al kiu pagas vi en la vendejoj? Ĉu al la vendistino aŭ al la vendejestro?

Kie vi ŝtas tranokti: en malkaraj gastejoj aŭ en karaj hoteloj? ...

..... Mi aŭdis, ke antaŭ kelkaj tagoj vi tranoktis en Hotel Hilton en Seoul. Ĉu vi tranoktis tie, ĉar vi konas la hotelestron persone?

Kiel bongustigas oni la manĝaĵojn en Koreio? Ĉu per sukero? Ĉu per salo? Ĉu mi bone pensas, ke koreoj havas sukeron en sukerujo?

..... Ĉu mi bone aŭdis, ke kelkaj koreoj havas sukeron ankaŭ en saluoj? Kion havas la koreoj en la akvujoj kaj kion havas ili en la supuoj? ...

..... Ĉu vi jam vidis abelojn en la arbaro? Ĉu vi timas, kiam vi vidas abelojn en via ĉambro? Ĉu mi bone pensas, ke abeloj vivas en abelujo?

Ĉu povas esti, ke estas homoj en Koreio kiuj havas monon, sed ne havas monujon? Ĉu povas esti, ke estas homoj en Koreio kiuj havas monujon, sed ne havas monon? Kio estas pli bona: “*Japanoj vivas en Japanio.*”, aŭ “*Japanoj vivas en Japanujo.*”? Ĉu povas esti, ke ambaŭ diroj estas bonaj?

..... Kio estas la ĉefurbo de Japanio kaj kio estas la ĉina ĉefurbo?

..... Ĉu mi bone scias, ke Hae Kang Sunim estas la ĉefulo de la Indramang Universitato?

Kia fraŭlino estas Inae kiam ŝi legas?

Ĉu mi bone scias, ke miaj familianoj estas miaj parencoj?
..... Ĉu vi havas maljunajn parencojn
en via familio kiuj bezonas vian helpon?
Kiu estas via onklo? Ĉu mi bone
pensas, ke via onklino estas la fratino de via edzo?
..... Kiu estas la avo de via filo?
..... Ĉu neniam povas esti ke
homo estas nepo de sia avino?
..... Kiom da nepoj havas viaj geavoj?
..... Ĉu kuzo estas frato de via
patrino? Kiom foje vizitas
vin viaj parencoj dum unu jaro? Kion
faras la studentoj de la Indramang Universitato dum la ripozse-
majno? Ĉu vi
kuiras bongustan tagmanĝon por viaj familianoj dum la semaj-
nofinaj tagoj aŭ tiam vi iras al restoracio de hotelo por tagman-
ĝi? Kiuj estas vidvinoj en
via familio? Kion faris
la edzo de vidvino? Ĉu foriris? Ĉu forpasis?
..... Ĉu vidvino ĉiam vivas sole aŭ povas esti, ke ŝi havas
kunulon? Nun estas ok membroj en
via familio. Kiom da homoj restos en via familio, se du el viaj fa-

milianoj mortas? Hieraŭ mia amiko
 parolis al mi pri sia fianĉino. Ĉu mi bone rememoras, ke virino
 fariĝas fianĉino post geedzeco?
 Ĉu ĉiuj fianĉoj estiĝas edzoj en Koreio?
 Kial ne?
 Ĉu povas esti, ke fraŭlo kaj fraŭlino estiĝas fianĉo kaj fianĉino,
 kiuj laboras en la sama laborejo?
 Ĉu povas esti ke edzo kaj edzino estas diversaj ŝtatanoj?
 Mi estas hungaro, sed Jinsim, mia malnova amikino
 estas koreino. Ĉu povas esti iam, ke ŝi edziniĝos al mi? Ĉu tio
 eblas en Koreio?
 Ĉu vi pensas, ke lerni ĉiujn lecionojn de via Esperanto libro
 sufiĉas por ke vi povu bone paroli esperante?
 Kie estas la vivo pli agrabla?
 Ĉu en vilaĝo, aŭ en urbo? Ĉu en la ĉefurbo?
 Jinsim estas mia bona amikino dum
 multaj jaroj, sed ŝi ankoraŭ ne decidis pri edziniĝo al mi. Kion mi
 faru? Kiel vi ŝatas
 decidi? Ĉu rapide, ĉu malrapide?
 Kian edzon vi ŝatus havi: Ĉu rapide decidantan, aŭ malrapide
 decidantan? Kiom da stratoj
 estas en vilaĝeto kaj kiom da stratoj estas en urbego?
 Kian vivon vi ŝatus havi? Ĉu
 simplan sed bonan, aŭ riĉan kaj malsimplan?

..... Kian vivon havas la homoj en la Silsangsa? Kio vivas en la porkejo kaj kio vivas en la ŝafa dometo en la vilaĝo?

..... Kial ne faras fajron la koreoj en la fornoj en julio? Ĉu la patrinoj manĝigas la bebojn, aŭ la beboj manĝigas la patrinojn en Koreio? Ĉu povas esti, ke ankaŭ la porkinoj manĝigas la porkidojn en la koreaj porkejoj? Ĉu tio estas kredebla? Ĉu nekredebla? Ĉu vi povas kredi, ke naskiĝis blanka tigrido en la seoula zoologia ĝardeno?

..... Mi legis en gazeto, ke amerika blanka virino naskis nigran bebon antaŭ nelonge. Ĉu tio estas kredebla? Kiel povas tio esti?

..... Ĉu mi bone rememoras, ke stalo estas bovina aŭ ĉevalina domo?

..... Ĉu ankaŭ bovoj kaj ĉevaloj povas vivi en staloj? Ĉu povas esti, ke ankaŭ vilaĝanoj tranoktas en staloj?

Hanna legas gazeton en sia ĉambro. Ĉu mi bone pensas, ke ŝi estas leganta kaj ŝia gazeto estas legata?

Gyeongsim skribas leteron al Inae. Kia estas Gyeongsim kaj kia estas la letero?

Kia estas Inae kiam ŝi legas la leteron?

lam mi tranoktis en stalo, kiam mi estis infano. Kion vi pensas pri tio? Ĉu tio estas ŝerco? Aŭ ĉu tio povis esti en Eŭropo antaŭ sesdek jaroj? Ĉu tiu historio estas kredebla? Ĉu nekredebla? Kio donas freŝan lakton kaj kio donas freŝan ovon al la vilaĝanoj? Ĉu la freŝa, aŭ la malfreŝa kimĉio estas pli bongusta? Estas multaj bongustaj fruktoj en la stratoj kaj en la vendejoj de Jagalchi. Kiajn vi ŝatas aĉeti: Ĉu freŝajn, ĉu malfreŝajn? Ĉu vi ne pensas, ke foje-foje la malfreŝaj fruktoj estas pli dolĉaj? Estas du diroj: “*La loĝantoj de Busan multe laboras.*” kaj “*La loĝantaro de Busan multe laboras.*” Kio estas pli bona? Kie estas la kamparo? Ĉu inter vilaĝaj stratoj aŭ ĉu apud la fino de la vilaĝo? Kie aperas neĝo unue en Koreio? Ĉu sur la montoj, aŭ en la kampoj? Kiam aperas neĝo en Seoul kaj kiam ĝi malaperas? Kial aperas neĝo en vintro? Ĉu mi bone legis, ke neĝo estiĝas de akvo? Kiel estiĝas neĝo? Se oni varmigas akvon, aŭ malvarmigas akvon? Pro kio malaperas la

neĝo printempe? Ĉu pro la varmeco de la suno aŭ pro la var-
meco de la fajro en la fornoj?

Kiel laboras la koreaj vilaĝanoj? Ĉu per maŝinoj aŭ per
manoj? Kiel ili laboris
antaŭe? Mi petis, ke
Gyeongsim donu al mi sian hejmtaskon. Poste ŝi diris al mi;
“*Jen.*”. Ĉu tio signifas, ke ŝia hejmtasko mankas?

..... Matene mi montris manĝaĵon al
Soyeon en la universitato antaŭ mia loĝejo. Ŝi rigardis la man-
ĝaĵon kaj vidis, ke en ĝi estis malgrandaj bestetoj. Tiam ŝi kriis.
Kial ŝi faris tion? Ĉu ŝi timis pri tiuj bestetoj?

..... Antaŭhieraŭ Inae diris al mi, ke ŝi havas
du karulinojn. Kion signifas tio? Ĉu ŝi havas du virojn kiuj estas
ŝiaj malamikoj, kiujn ŝi ne ŝatas?

..... Hieraŭ Soyeon aperis en la Indramang
Universitato kun korea junulo. Ŝi diris al mi: “*Jen mia amiko.*” Ĉu
tio signifas, ke ŝia amiko havas japanan monon?

..... Kiuj estas viaj gekaruloj?

..... Ĉu vi jam karesis iam
bovidon, ŝafidon aŭ katidon?

Kion faras via edzo, kiam vi ploras? Ĉu li karesas vian kapon,
aŭ donas al vi pli da mono?

..... Kiam karesas instruisto
la kapon de lernantino en lernejo? Ĉu kiam la lernantino bone

respondas, aŭ kiam ŝi silentas, ĉar ne scias la respondon?
 Kiam vi ĝojis dum ĉi tiu
 monato kaj pro kio vi faris tion?
 Ĉu vi ĝojas, kiam vi estas
 feliĉa, aŭ vi malĝojas tiam?
 Ĉu povas esti, ke koreino ploras, kiam ŝi estas feliĉega?
 Hieraŭ Gyeongsim volis viziti mian malnovan amikinon
 en Busan, sed ŝi trovis, ke Jinsim estis for. Ĉu tio signifas, ke ŝi
 trovis mian amikinon en ŝia hejmo kaj ŝi povis kunparoli kun
 Jinsim?
 Gyeongsim bone scias, ke la busanaj fiŝistoj kaptas multajn fi-
 ŝojn ĉiu matene kaj pro tio ĉiam estas freŝaj fiŝoj en Jagalchi.
 Pro tio ŝi volis manĝi bongustan manĝaĵon kun Jinsim. Kion vi
 pensas: Ĉu ili volis manĝi tie fiŝojn, aŭ fiŝaĵojn?
 Inae legas la leteron de Gyeongsim. Kia
 estas Inae kaj kia estas nun la letero?
 Ĉu vi vidis iam legatan libron?
 Kiam vi vidis tian libron?
 Ĉu vi jam vidis iam ludantan infanon? Kiam vi vidis tian infa-
 non? Hodiaŭ mi
 veturas el Gangbyeon al Hamyang per aŭtobuso, sed en ĉi tiuj
 minutoj nia aŭtobuso haltas en haltejo por ripozi. Kia estas nun
 nia aŭtobuso? Kion faras la akvo
 en la Han rivero? Ĉu fluas aŭ staras?

En la dekseca leciono Gyeongsim diris al mi, ke ŝi vidis, ke Jinsim, mia malnova amikino pulgokion manĝis en busana restoracio kun amerika homo. Por mi estis interesa, ke ili pulgokion manĝis, kvankam estas multaj fiŝrestoracioj en tiu granda urbo, kie oni povas manĝi tre bongustajn freŝajn fiŝaĵojn. Kion vi pensas, kial diris Gyeongsim al mi, ke Jinsim pulgokion manĝis kun la amerika homo?

Ĉu povas esti, ke Jinsim pli bone ŝatas la pulgokion ol la fiŝaĵon? Aŭ ŝi diris tion al mi, ĉar en la dekseca leciono ŝi ankoraŭ ne sciis, kiel nomiĝas fiŝo en esperanto?

En la deksepa leciono Gyeongsim rakontis al mi alian historion. Kion faris mia Jinsim en tiu historio kun la amerika homo, dum ĉiuj aliaj homoj dormis en Busan?

Ĉu estis iam, ke vi kaptis fiŝojn en la koreaj riveroj?

Ĉu mi bone pensas, ke dum vintro fiŝistoj ne povas kapti fiŝojn en la koreaj riveroj, ĉar tiam neĝo estas sur la akvo de la riveroj? Kiom foje faras vi ordon en via ĉambro?

Kiu faras ordon en la kuirejo en via familio kaj kiuj faras ordon en la kuirejo de la Indramang Universitato?

..... Kio lacigas vin? Ĉu multe da laboro, aŭ senlaboreco, kiam vi faras nenion dum la tuta tago?

..... Ĉu mi bone scias, ke

estas multaj nemanĝeblaj fungoj en la koreaj arbaroj?
..... Kio estas, se bestoj en la arbaro manĝas nemanĝeblajn fungojn?
Ĉu vi jam kolektis fungojn kaj florojn en la arbaro?
..... Kion vi kolektas? Ĉu monon? Ĉu fungojn? Ĉu amikojn? Kio donas pli da lumo: la suno aŭ la steloj? Kial ne povas oni vidi stelojn sur la ĉielo tagmeze?
..... Kial ne videblas la suno nokte?
..... Ĉu mi bone rememoras, ke nenie videblas la suno, kiam estas nokto en Koreio?
..... Ĉu povas esti, ke oni povas vidi ambaŭ la sunon kaj la lunon sur la ĉielo?
..... En Eŭropo kelkaj homoj diras, ke homoj, kiuj mortis, iris en la ĉielon. Ĉu ankaŭ koreoj diras tion? Ĉu povis vidi Jinsim kaj John stelojn sur la ĉielo kiam ili estis en la arbaro ĉirkaŭ Busan? Kiu atendas vin vespere en via hejmo? Ĉu via edzo? Ĉu via hundeto?
..... Kiel dormas katoj kaj kiel dormas ĉevaloj? Kiuj el ili dormas kuŝante kaj kiuj dormas starante? Ĉu vi povas dormi sidante en flugmaŝino? Ĉu vi havas bopatrinojn? Kio estas Hae Kang Sunim?

..... Kies fratino estas via
onklino? Kies filino vi
estas? Kion povas vi fari?
Ĉu vi povas babili dancante aŭ ĉu vi povas danci babilante?
..... Kiam estas patrino pli
juna, ol sia filo? Kie estas ido pli granda
ol sia patrino? Kiel kuras hundido kaj
kiel kuras forta juna hundo?
..... Kial ne manĝas tigroj fruktojn?
..... Apud kiu rivero troviĝas la
Esperanto Oficejo en Mapo? En kiun
lernejon iris vi unue en via vivo?
Al kiu viro edziniĝis vi? Super kio flugas
la birdoj? En kio naĝas la fiŝoj?
..... Kiom da fungoj estas dum vintro en
la koreaj arbaroj? Kia estas la koko
en la korto sen kokinoj kaj kia li estas kun kokinoj?
..... Ĉu povas esti, ke kokinoj donas
ovojn kvankam ne vivas koko en la korto?
Kia estas la akvo en la Han rivero?
Ĉu la fluanta aŭ la staranta akvo estas pli pura?
..... Kion pensis John pri mia Jinsim? Ĉu li
pensis, ke ŝi estis bona instruistino aŭ li pensis, ke ŝi estis mal-
bona?

Kiel vi fartas? Dankon, bone.
Ne, koko neniam povas doni ovojn.
Ĉar ni havas nur kokojn en la korto.
..... Ĉiam.
..... Ĉie en Koreio.
..... Iam estis, sed nun ne estas. Ili nun
estas nur en Japanio.
..... Vi malbone scias. Ili ankaŭ
tagmeze estas sur la ĉielo, sed tiam ili ne videblas.
..... Trifoje tage.
..... Ne nur en la Indramang
Universitato, sed ankaŭ en la Silsangsa.
..... Mi ne bezonas monon, ĉar mi ricevas
bibimbapon ĉiutage trifoje en la manĝejo.
..... Ne. Tio tute
ne signifas tion.
Ĉar ŝi diris al mi, ke ŝi amas min.
..... Kiam vi aŭdis tion? Mi ne povas
kredi, ke ŝi kune dormis kun John.
..... Kial ne? Mi ĉiam ŝatas vidi bonajn
filmojn. Antaŭ du
jaroj. Rapide.

..... Pli rapide, ol mi.
..... La Himalaya estas
la plej alta. Ne pro tio
mi timas. Mi timas, ke povos esti tre malvarma en la arbaro.
..... Ne pro tio mi
ne manĝas. Mi timas, ke tiuj fungoj ne estas manĝeblaj.
..... La problemo estas,
ke via filo ne iris en la lernejon. Li iris nur al la lernejo kaj antaŭ
la pordego de la lernejo li ludis kun aliaj infanoj dum duonhoru.
..... Jes, estas. Multaj montoj
estas en Koreio. Jes, ĝi estas en la
ĝardeno. Dum du
horoj. Super la arboj.
..... Tio estis vendrede.
..... Kvardek ok.
..... Ne tie. Mi naskiĝis
en Jinju.
..... Vi malbone rememoras. Tiam mi estis nur
okjara.
Ne nur kelkaj. Ĉiuj koreaj infanoj tiam komencas.
..... Mi volas, sed mi ne povas. Ĉar
tiam mi instruas en la Silsangsa Jakeun Hagkyo.
..... Ne nur ŝi. Ĉiuj gestudentoj
estas helpemaj kaj bonkoraj en la Indramang Universita-

to Neniam en mia vivo.
..... En la labortagoj je
la sesa horo kaj en la ripoztagoj je la sepa horo.
..... Busanaj fiŝistoj kaptas
ankaŭ tiajn, sed mi neniam kaptis.
.....
Mi pensas, ke la homoj, kiuj tiel parolas, ne estis en la loĝejo de
mia Jinsim dum tiu tempo. Do ili tute ne scias, kio estis kaj kio
ne estis tie dum tiu nokto.
..... Tio ne estas
vera. Eŭropaj homoj ne ripozas sen vestoj en la arbaroj. Sed
estas multaj homoj en Eŭropo, kiuj ripozas sen vestoj apud la
maroj.
La amerikaj homoj estas pli altaj.
..... Ŝi estas pli juna ol mi.
..... Nur kelkaj birdoj manĝas aliajn birdojn.
.....
Mi pensas, ke tio ne estas vera. Homoj ne povas manĝi lumon.
.....
Mi pensas, ke vi bone aŭdis. La mesilfruktoj ne povas maturiĝi
sen varmeco.
..... Vi malbone pensas.
En aŭtobusoj ne vojaĝas ĉevaloj en Hungario.
..... Ne estas tiel. Katoj ne manĝas kimĉion.

En la lastaj semajnoj mi ne povis vidi mian amikinson. Kiam ajn mi iris al ŝia domo en Dong Daegu, tiam mi vidis, ke ŝi ne estis hejme. Same estis ankaŭ en Busan. Kaj tio okazis ne nur unufoje, sed dufoje aŭ trifoje. Ŝia pordo ĉiam estis fermita. Mi ne sciis, kio okazis al ŝi. Poste mi ricevis leteron el Ameriko. Mia malnova amikino, Jinsim skribis al mi, ke ŝi vojaĝis al Ameriko kun John. Ŝi skribis, ke ŝi min amas kaj vojaĝis al Ameriko nur por instrui esperanton. John diris al ŝi, ke ŝi tre bone povas instrui lingvojn kaj petis, ke ŝi instruu esperanton ankaŭ en Ameriko. Tion skribis mia amikino al mi kaj nun mi ne scias, kion mi faru. Ĉu vi pensas, ke mia Jinsim amas min kaj ŝi estas mia vera bona amikino? Ĉu vi pensas, ke mia Jinsim bone instruos la internacian lingvon ankaŭ en Ameriko kaj pro tio baldaŭ multaj geesperantistoj estiĝos ankaŭ tie? Ĉu mi esperu, ke iam mia Jinsim revenos al mi al la Jirisan kaj iam mi povos edziĝi al ŝi? Estas gravaj demandoj kaj mi ne scias la respondojn. Kion vi pensas pri ĉi tiuj demandoj? Kial vi pensas, ke vi ankoraŭ ne estas preta por edziniĝi? Kian edzon ŝatus vi havi? Ĉu infanecan? Ĉu amikecan?

..... Ĉu mi bone scias, ke granda fiŝo manĝas
fiŝaĵon kaj homo manĝas malgrandan fiŝon?

..... Mi legis en libro, ke
estas hundo en Ameriko, kiu ne naskiĝis, sed estiĝis de ovo. Ĉu
tio estas kredebla?

Bak Gilsu
etas maljuna, sed juneca. Ĉu mi bone pensas, ke kvankam li
estas sepdekjara, tamen li neniam laciĝas, bone laboras, kiel
kvardek jaruloj kaj feliĉe ludas kun siaj genepoj?

..... Mia frato hieraŭ trinkis bieron, hodiaŭ
trinkas lakton kaj morgaŭ trinkos vinon. Ĉu mi bone pensas, ke
li estas trinkinta vinon kaj trinkonta lakton?

..... Kian vi estas trinkonta?

..... Kia estas la biero, la lakto kaj la
vino?

Jinsim kaj John manĝis pulgokion en Busan. Ĉu ili estas pulgo-
kion manĝintaj homoj?

Kiu
homo estas bibimbapon ne manĝinta homo? Ĉu kiu neniam
manĝis bibimbapon, aŭ kiu nuntempe ne manĝis tion kaj nur
antaŭ multaj jaroj unufoje en sia vivo faris tion?

..... Granda fiŝo manĝis malgrandan fiŝon
en rapida rivero. Kia estas la granda fiŝo, kia estas la malgran-
da fiŝo kaj kia estas la rivero?

..... Morgaŭ vi legos
leteron. Kia estas la letero kaj kia vi estas?

Kion vi pensas? Ĉu neniu scias, kio okazos en la estonto, aŭ saĝuloj legis la historion de la pasinto kaj pro tio ili antaŭvidas la estonton?

Kion instruas la proverbo: “Ĝi malaperis, kiel la pasintjara neĝo.”?

Via amikino diras al vi, ke ŝi estas tre malfeliĉa, ĉar sia edzo mortis. Ŝi diras, ke dum noktoj ŝi ne povas dormi, ĉar ŝi ĉiam pensadas pri sia juneco, kiam ŝi feliĉe vivis kun sia edzo. Kaj ŝi aldonas, ke sia instruisto diris al ŝi, ke “*Neniam revenos la pasinta tempo.*” Ŝi aŭdis tion, sed ŝi ne komprenas, kion ŝia instruisto volis diri al ŝi per tiu proverbo. Ĉu vi povas helpi ŝin kompreni la signifon?

..... Eŭropa proverbo diras: “*Uzu la tempon estantan, antaŭvidu la estontan kaj memoru la estintan!*” Kion diras tiu proverbo al vi? Kiel povas vi saĝe vivi?

..... Ĉu la afero, kiu okazis en la busana arbaro estas okazintaĵo, aŭ okazantaĵo? En aprilo kvindek koreaj esperantistoj renkontis en arbara lernejo apud Dong Daegu por kune lerni esperanton. Ĉu mi bone scias, ke tio estis renkontiĝo? Ankaŭ en Japanio ofte okazas esperantistaj renkontiĝoj, kie la ĉeestantoj kune loĝas en arbara domo. Ĉu mi bone rememoras, ke tiuj renkontiĝoj nomiĝas kunloĝadoj?

Ĉu estas multaj koreoj, kiuj kolektas monon en sia tuta vivo? ...
 Kia estis la korea historio
 en la pasinteco? Ĉu ĉiam feliĉa? Ĉu foje-foje malbona kaj mal-
 facila? Kiu estis la plej granda
 korea reĝo kaj kiam li vivis?
 Fiŝisto kaptis grandan
 fiŝon en la Han rivero. Kiu estas la kaptinto kaj kio estas la kap-
 tito? Kio
 estas la Hangang? Ĉu riverego, aŭ rivereto?
 Kion diras al vi la “*Kanto de l’espero*”? Ĉu tio diras, ke ĉio estas
 bone en la mondo kaj pro tiu oni povas havi la esperon, ke an-
 kaŭ la estonteco de la homaro estos bona kaj brila?

 Kion signifas “*homaro*”?
 Ĉu mi bone pensas, ke homaro signifas ĉiujn homojn, kiuj vivas
 en Azio, en Afriko, en Eŭropo kaj en Ameriko, sed la homoj de
 Aŭstralio ne estas partoj de la homaro, ĉar ili vivas malproksi-
 me?
 Mi legis, ke “*Meze de vintro malvarma kantas ankoraŭ birdeto.*”
 Ĉu mi bone komprenas, ke tio signifas, ke kvankam la vintro es-
 tas malvarma kaj pro tio multaj birdoj mortis aŭ forflugis, tamen
 ne ĉiuj faris tion. Ĉar restis birdeto, kiu ankoraŭ vivas kaj bele
 kantas en la kampoj. Pro tio oni povas esperi, ke la malvarma
 vintro baldaŭ malaperos kaj denove venos printempo, kiam la
 suno agrable brilos kaj multaj birdoj kantos en la kampoj kaj ar-
 baroj. Ĉu mi bone komprenas la signifon?

..... Mi legis, ke “*Meze de vintro malvarma ... en la nokto malhela lumas ankoraŭ steleto.*” Kion signifas tio? Skribu viajn pensojn longe!

.....
.....
Mi legis, ke “*Meze de nigra nubaro brilas ankoraŭ la suno.*” Kion signifas tio?

.....
.....
Mi legis, ke “*Blovas la suda venteto malgraŭ la griza aŭtuno.*” Kion signifas tio?

.....
.....
Mi legis, ke “*Meze de mond’ egoista batas la koro amanta.*” Kion signifas tio?

.....
.....
Mi legis, ke “*Meze de horo malgaja ridas espero flamanta.*” Kion signifas tio?

.....
.....
Hieraŭ vi vidis filmon en nova televidilo. Kia estas vi, kia estas la filmo kaj kia estas la televidilo?

Ĉu vi havas, aŭ ne havas esperon, ke la estonteco de via familio estos brila, gaja kaj feliĉa?

..... Ĉu vi havas, aŭ ne havas esperon, ke la historio de Koreio kaj ankaŭ de la tuta mondo estos brila, gaja kaj feliĉa iam en la estonteco?

..... Kio estas pli granda: Azio aŭ la mondo? Kiu parto de la tago estas hela kaj kiu estas malhela?

..... Kiel vi povas pli bone vidi en malhela vespero? Ĉu kun okulvitroj? Ĉu sen okulvitroj?

..... Ĉu ofte aŭ malofte estas nubaro sur la korea ĉielo? Kial ne povas oni vidi la sunon kiam nubaro estas sur la ĉielo? Ĉar tiam la suno malaperas? Ĉar tiam la suno brilas sur la alia parto de la mondo? Ĉar tiam la suno estas malantaŭ la nubaro?

..... Kio estas pli granda: la suno aŭ la nubaro? Ĉu mi bone rememoras, ke Nanking (Nanjing) estis la suda ĉefurbo de Ĉinio iam? Ĉu mi bone pensas, ke la signifo de Namsan estas Suda Monto?

..... Kiam estas pli malvarma en vintro? Ĉu kiam estas forta vento, aŭ kiam estas neniam vento?

..... La amikino de mia amikino estas tre bela kaj pro tio multaj riĉaj junuloj volis edziĝi al ŝi. Malgraŭ la multaj riĉaj junuloj ŝi edziniĝis al malriĉa sed saĝa kaj bonkora junulo. Kion vi pensas, kial ŝi faris tion?

..... Rozo kaj muso havas diversajn kolorojn. Kiu el ili estas griza?

..... Kiujn virojn ŝatas vi pli bone? Ĉu kiuj havas nigran hararon aŭ kiuj havas grizan hararon?

..... Per kio vi blovas?

Ĉu mi bone rememoras, ke iam estis ŝipoj kiuj povis veturi nur kiam vento blovis? Ĉu tio estas kredebla?

..... Kion vi faras per via lango?

..... Kion faras kaj kion ne faras egoista homo?

..... Ĉu viaj geamikoj estas egoistaj aŭ malegoistaj?

Kio estis la plej gaja kaj kio estis la plej malgaja okazaĵo en via vivo?

..... Kiam okazis tiuj okazaĵoj?

Ĉu estas flamo en la koreaj kuirejoj? Ĉu oni kuiras kaj varmigas manĝaĵojn tie per fajro?

Ĉu oni varmigas la dormĉambrojn en Koreio per flamo? Ĉu estas fornoj tie, kaj ĉu en ili estas fajro?

.....

Ĉu koreoj heligas la domojn per flamo?

..... Ĉu estis tempo en la pasinteco,
kiam oni heligis tiel ĉie en la korea ĉefurbo?

Kiuj ĉerizoj estas pli dolĉaj: la maturiĝintaj ruĝaj, aŭ la verdaj?
..... Ĉu mi bone pensas, ke la
ruĝaj ĉerizoj estas pli dolĉaj ol la verdaj, ĉar en ili estas pli multe
da sukero kaj la sukero estas ruĝa?

..... Ĉu mi bone
rememoras, ke apud la universitata ĝardeno estas malgranda
herbejo en la Jirisan? Kiam
floras la herboj en la herbejoj kaj kiam floras la mesilarboj?

..... Ĉu mi bone pensas, ke ĉevaloj
kolektas mielon en Koreio?

Kian koloran havas la ĉielo?

Mi rigardas la ĉirkaŭaĵon de mia vilaĝo tra la fenestro. Mi vidas
kelkajn unuopajn nubojn kaj verdan kamparon. Kiu el ili estas
sub la horizonto kaj kiu estas super la horizonto?

..... Ĉu la luno aŭ la suno estas
pli proksime al la tero?

Kiam estas feria monato en la Indramang Universita-
to? Homoj havas sepdek
aŭ okdek jarojn por vivi. Kiel uzas saĝulo kaj kiel uzas stultulo
tiujn sepdek aŭ okdek jarojn?

.....

Kial precipe la infanoj ĝojas somere en Koreio?

..... Hodiaŭ la patrino de Soyeon alvenis al la Jirisan por viziti sian filinon en la universitato. Nun ĉiuj studentoj estas gajaj en la klasĉambro sed mi ne komprenas kial Soyeon estas precipe gaja.

..... Hieraŭ mi ekskursis en la arbaroj en la Jirisan, sed mi timis, ke mi ne trovos mian vojon por reveni al la Silsangsa. Mi timis pro tio, ĉar mi nenie vidis vojmontrilojn en la arbaro. Mi ne komprenas, kial Jinsim kaj John ne timis, kiam ili ekskursis en la busana arbaro.

..... Hieraŭ mi renkontiĝis kun egoista homo. Mi parolis kun li, sed mi pensis, ke li ne interesiĝis pri mia parolado. Ĉu mi bone pensas, ke egoistuloj neniam interesiĝas pri aferoj de aliuloj?

.....--..... Mi legis en libro, ke antaŭe multaj amerikaj soldatoj laboris en Koreio. Mi legis, ke japanino amis unu el tiuj soldatoj, sed tiu soldato ne amis ŝin. Tiu soldato amis koreinon. Kiu el tiuj virinoj estis amantino kaj kiu estis amatino?

Ĉu povas esti, ke la amerikano ne amis la japaninon, ĉar ŝi ne povis kuiri bongustan bibimbapon trifoje ĉiutage?

.....

Ĉu vi pensas, ke tia historio povas esti nur en libroj, sed tia afero neniam okazas en la vera vivo? Mi interesiĝas pri via personaj pensoj.
 Kiam maturiĝas la fragoj en Koreio? Kiom kostas unu kilogramo da frago en la koreaj fruktovendejoj?
 Kies akvo estas pli pura? Ĉu la akvo de la Han rivero, aŭ la akvo de la rapidaj montaraj riveretoj?
 Kiam vi ellitiĝas en la labortagoj kaj kiam faras vi tion dum via ferio?
 Gyongsim volas veturi el Hamyang al Sasang. Kie ŝi ekveturos kaj kie ŝi enbusiĝos, kiam ŝi reveturos al la Jiri montaro?
 Kia akvo estas pli pura, Ĉu la fluanta, aŭ la staranta? Kiu akvo estas pli pura: la klara aŭ la malklara?
 Ĉu mi bone pensas, ke la klara akvo facile travideblas?
 Por kelkaj homoj ne estas klara, kial Jinsim senvestiĝis en la arbaro. Ĉu vi povas klarigi tion al ili?
 Hodiaŭ matene mi instruis esperanton al Maneog en la Indramang Universitato. Poste mi veturis al Busan. Posttagmeze mi vidis, ke Maneog promenis en strato de Jagalchi. La afero ne estis klara por mi, ĉar Maneog ne veturis kun mi en la aŭtobuso. Poste li diris al mi, ke li veturis per alia aŭtobuso. Tiel la afero klariĝis al mi, sed mi ne scias, kial li veturis al Busan. Ĉu povas esti, ke li veturis tien,

ĉar li volis vidi, kia bela estas mia Jinsim? Mi interesiĝas pri viaj
 personaj pensoj.
 Kial ne
 videblas la fundo de la Hangang en Seoul kaj kial videblas la
 fundo de la jirisanaj riveretoj?
 Kie estas pli da ŝtonoj: en la kamparo,
 aŭ en la montaro? Kion vi emas
 fari, kiam vi estas laca? Ĉu lerni plu, aŭ ripozi iomete?
 Hieraŭ mi trovis bonan
 dancejon en Jinju. Ĝis kiam volas vi tie danci kun mi? Nur ĝis
 noktmezo, aŭ plu? Ĉu
 estas bestoj en Koreio, kiuj povas salti?
 Kiu besto povas pli longe salti:
 hundo aŭ kato? Ĉu
 vagonaro povas traveturi tunelon?
 Ĉu koreaj aŭtobusoj povas veturi tra tuneloj?
 Ĉu homo povas trasalti rivereton?
 Ĉu mi bone pensas, ke neniu
 koreo povas trasalti la Han riveron?
 Kiel do iras koreoj tra tiu rivero?
 Skribu mallonge kio okazis en la busana arbaro, kiam John kaj
 Jinsim lernis esperanton tie!

Ĉu estas kredebla, ke estas kelkaj homoj, kiuj tute ne havas
ombron? Kiam havas
kaj kiam ne havas ombbron la arboj?
..... Ĉu mi bone rememoras, ke
mi vidis arbon ie en Koreio, kiu tute ne havis branĉojn?
..... Kiajn branĉojn havas la arbegoj?
..... Ĉu estas kredebla, ke estas
arbo ie en Koreio, kies branĉoj estas pli ol ducent kilogramoj? ..
..... Ĉu povas esti, ke en herbejo vivas
ne nur herboj, sed ankaŭ floroj?
..... Kion vi faras, kiam vi kolektas fruktojn
en la arbaro? Ĉu vi rapide manĝas ilin, aŭ ĉu vi metas ilin en
korbon? Ĉu vi rapide
manĝas ankaŭ la fungojn en la arbaro?
..... Ĉu ĉiuj fungoj manĝeblas en Koreio sen
kuirado? Ĉu la akvo de la montaraj
riveretoj estas trinkebla? Ĉu la akvo de
la Han rivero ne estas trinkebla, ĉar ĝi estas tre sala, aŭ ĉar ĝi
estas tre malpura? Kiel
pasis viaj ripoztempoj sabate kaj dimanĉe?
..... Kiel vi pasigos la semajnojn de via
somera ferio?

Ĉu vi vojaĝos ien dum la feriaj tagoj?
 Ĉu mi bone komprenas,
 ke vi ne volos vojaĝi al Ameriko, ĉar vi ne havas flugmaŝinon?
 Estas du diroj:
 “*Gyeongsim tre ofte veturas inter Hamyang kaj Busan.*” kaj
 “*Gyeongsim tre ofte vojaĝas inter Hamyang kaj Busan.*” Kiu el
 tiuj diroj estas pli bona?
 Mi aŭdis, ke Inae perpiede iris el la Silsangsa al la Himalaya
 Kafejo. Kial ne vojaĝis ŝi tien per loka aŭtobuso? Ĉu ĉar tiu bu-
 so malofte veturas?
 Ĉu vi iam vojaĝis al alia lando? Ĉu
 eblas vojaĝi el via lando al Japanio per ŝipo?
 En kiuj fremdaj landoj pasigis vi unu semajnon,
 aŭ pli? Ĉu mi bone
 rememoras, ke en Busan estas ne nur rivero, sed ankaŭ granda
 maro? Jinsim diris al mi,
 ke ŝi renkontis John en Jagalchi. Ĉu povas esti, ke tiu renkonti-
 ĝo okazis apud la maro?
 Kia akvo estas pli sala: la rivera akvo, aŭ la mara akvo?
 Ĉu mi bone pensas, ke la mara akvo ne estas
 trinkebla? Kial ne estas trinkebla la
 mara akvo? Kion vi pensas,
 kiam vi vojaĝas al la maro?
 Kion vi pensas, kiam vi vojaĝas sur la maro?

..... Kiam vi ŝatas kaj kiam vi ne ŝatas vojaĝi sur la maro? Kiam la vetero estas venteta, aŭ kiam ĝi estas ventega? Aŭ kiam tute ne estas vento?

..... Kion signifas, ke la nuboj staras sur la ĉielo kaj kia estas la vetero, kiam la nuboj rapide naĝas sur la ĉielo?

..... Ĉu mi bone scias, ke Busan estas en la suda parto de Koreio?

..... Kiu urbo estas la ĉefurbo de Tailando?

..... Kion rimarkis Gyeongsim, kiam ŝi ekskursis en la arbaro ĉirkaŭ Busan?

..... Ĉu iam okazis al vi, ke vi agrable babiladis kun via amikino en kafejo, kaj ne rimarkis, ke la tempo rapide pasis?

..... Ĉu vi rimarkas dormante, ke via edzo kisas vin?

..... Kion vi sentis, kiam via amiko diris al vi, ke li volus edziĝi al vi?

..... Kion vi sentus, se via edzo dirus al vi, ke li ne plu volos vivi kun vi?

..... Mi vidas, ke vi ne volas manĝi doenjang supon. Kion vi sentas? Ĉu vi sentas, ke la supo estas tre varma?

..... Estas kelkaj libroj en la urba librovendejo, kiujn vi neniam legis kaj neniam legos, ĉar ili ne estas interesaj. Kiaj estas tiuj libroj?

.....

Kial vi pensas, ke nun pluvas? Ĉar iom da akvo falis sur mian kapon. Tiam tre ofte pluvas en mia lando. Tri foje, aŭ kvar foje en semajno. Ne nur en Koreio, sed ankaŭ en Japanio. Jes, vi bone scias. Ankaŭ arboj povas fali, kiam oni tranĉas ilin en la arbaro. En Tailando pluvas pli ofte. Mi ne kredas tion, ĉar tio estas tute nekredebla. Neniam demandu min: Ĉu mi amas vin, aŭ ne amas. Vi mem devas senti la respondon en via koro. Dum la tuta nokto pluvis. Nur je la sesa horo matene ĉesis pluvi. Jes, ĝi estas en la korto. Ĉar mi ne amis lin. Kvankam li estis riĉa, mi tute ne volis edziniĝi al li. Jes, tio estas vera. Sed kvankam miaj gepatroj volis edzinigi min, tamen pri tiu afero ili ne povis decidi. Li havis amikinojn, kaj li volis kaŝi ŝin sub la lito. Sed mi alvenis hejmen posttagmeze kaj mi volis purigi la plankon sub la lito. Tiam mi vidis la fraŭlinojn sub la lito

kaj pro tio diris al li, ke mi ne plu volos vivi kun li. Ĉu estas kla-
 ra? Jes, tio estas
 vera. Li estas tre riĉa. Sed se mi ne estas amata, tiam mi ne po-
 vas esti feliĉa. Pro tio mi decidis vivi sen li.
 Ĉio estas finita, mi jam volas
 kaj povas fari nenion.
 Mi volonte farus tion, sed mi ne havas plumon.
 Je la kvara horo.
 Post tagmeze, ne matene.
 Mi volos simple multe dormi.
 Mi neniam vojaĝis al tiu
 lando. Ĝis la
 vespermanĝo.
 Inter Hamyang kaj Gangbyeon.
 Per rapida buso. Per buŝo.
 Ne, vi
 malbone scias. Nanking neniam estis korea urbo.
 Vi malbone memoras,
 ĉar ankaŭ en Busan estas Namsan.
 Koreoj neniam manĝas fiŝojn. Ili manĝas nur
 fiŝaĵojn. Ili kostas
 kvin mil wonoj. Ne, vi
 ne povas antaŭpagi. Unue metu la fruktojn en la korbon kaj
 poste iru al la vendistino por pagi.

..... La hundo kuras pli rapide.
..... Tio nomiĝas azenido.
.....
Kvankam mi ne estis tie, mi ne kredas, ke tio povis okazi.
..... Kial ne?
..... Ne nur pro tio. Sed mi
volis demandi lin, kiel vi pensas pri mia Jinsim.
..... La vitro estas pli
travidebla. Akvo estas travidebla nur se tio estas pura.
..... Tio neniam estas travidebla.
..... Vi malbone scias. Tio ne
estas videbla, sed estas aŭdebla.
..... Tio ĉiam videblas, ĉar tio
neniam estas sub vestaĵo.
..... Mi tute ne timas pri tio.
.....
Mi povas diri nenion kontraŭ tio.
..... Ĉar li enlitiĝis kaj post du minutoj
ekdormis. Per mia
dekstra mano. Mi ne
bezonas vekhorloĝon, ĉar la kokoj vekas min je la kvina horo en
la Jirisan. Mi nomiĝas
Gisuk.
Vi malbone scias. Mi ne naskiĝis en Koreio sed en Sud-Ameriko

- Kara Gyeongsim, mi tre ĝojas vidi vin denove. Mi ne vidis vin en la lastaj kvin jaroj. Tiam vi ne volis edziniĝi al mi. Pro tio mi edziĝis al Jinsim.

- *Mi scias, ke vi ne estus edziĝinta al Jinsim, se mi estus volinta edziniĝi al vi.*

- Sed tiu geedzeco ne sukcesis kaj pro tio ni divorcis.

- *Mi scias, ke vi ne estus divorcinta*

- Poste mi legis, ke japaninoj estas tre obeemaj kaj mi edziĝis al Youko.

- *Mi scias, ke vi ne*

- Sed ankaŭ tiu geedzeco ne sukcesis kaj pro tio mi denove divorcis.

- *Mi scias, ke vi ne*

- Poste mi vidis, ke eŭropaj virinoj estas belaj kaj pro tio mi edziĝis al germana blondulino.

- *Mi scias, ke vi ne*

- Sed ankaŭ tiu geedzeco ne sukcesis kaj pro tio mi denove divorcis.

- *Mi scias, ke vi ne*

- Poste mi aŭdis, ke amerikaj virinoj estas riĉaj kaj mi edziĝis al

la kalifornia Mary Blue.

- *Mi scias, ke vi ne*

.....
- Sed ankaŭ tiu geedzeco ne sukcesis kaj pro tio mi denove divorcis.

- *Mi scias, ke vi ne*

.....
- Poste mi vidis en filmo, ke aŭstraliaj virinoj estas tre bonaj en la lito kaj mi edziĝis al Kristina en Sydney.

- *Mi scias, ke vi ne*

.....
- Sed ankaŭ tiu geedzeco ne sukcesis kaj pro tio mi denove divorcis.

- *Mi scias, ke vi ne*

.....
- Poste mi pensis, ke afrikaj virinoj estas tre ekzotikaj kaj mi edziĝis al la nigra Loulou.

- *Mi scias, ke vi ne*

.....
- Sed ankaŭ tiu geedzeco ne sukcesis kaj pro tio mi denove divorcis.

- *Mi scias, ke vi ne*

.....
- Estas tio, pro kio mi tre amas vin, mia kara Gyeongsim. Vi estas tre komprenema.

Ĉu mi bone komprenas, ke leginda libro estas interesa libro, kio estas bona por legi?

Jinsim diris al mi, ke en la venonta semajno estos rigardinda filmo en Dong Daegu. Ĉu mi bone pensas, ke mia amikino volas, ke ni ne rigardu tiun filmon, sed iru eksursi al la arbaro?

..... Kiam vi ridas? Ĉu kiam vi aŭskultas ridindan ŝercon aŭ kiam via amiko diras al vi malbonan novaĵon? Diru al mi plorindan historion!

..... Kia estas la lando, se via edzo diras, ke pro ĝia beleco vi vizitu ĝin? Kion vi faras, kiam vi aŭdas ridindan historion?

..... Kio estas vidindaĵo? Ĉu malbela, malnova domo, kiun ne indas vidi, ĉar tio estas tre malpura?

..... Kio estas memorindaĵo?

Mi legis en gazeto, ke en Ameriko naskiĝis bebo kun flugiloj kaj per tiuj flugiloj li pli rapide povas flugi, ol birdo. Ĉu tio estas kredbla? Ĉu tio estas kredinda?

..... Kion vi pensas pri Jinsim, mia malnova amikino en Dong Daegu? Ĉu ŝi estas aminda? ...

..... Kial pensas kelkaj koreoj, ke mia Jinsim ne estas aminda?

.....
Ĉu vi bedaŭras, ke vi ne vidis, ke mia Jinsim estas tre bela?

..... Hodiaŭ matene Hanna diris al mi: “*Saluton, Gabor. Kiel vi fartas? Bedaŭrinde hieraŭ mi ne povis iri al la klasĉambro, ĉar mi malsaniĝis.*” Ĉu mi bone pensas, ke ŝi ĝojas, ke hieraŭ ŝi ne povis iri al la klasĉambro?

..... Estas du diroj. Kiu el ili estas pli bona? “*Ĝojinde mi ne vidis vin dum du monatoj.*” aŭ “*Bedaŭrinde mi ne vidis vin dum du monatoj.*”

Kion devas vi fari dum kuirado, se vi ne volas, ke la supo estu tre sala? Ĉu vi devas ofte gustumi la supon, aŭ ĉi vi devas manĝi la tuton?

..... Ĉu mia amikino povis bone sunumi en la busana arbaro?

..... Kelkaj koreoj diris al mi, ke ili pensas, ke mia amikino tute ne povis bone sunumi tie. Kiel ili pensas tiel?

..... Ĉu vi povas sunumi en ombro sub arbo?

..... Inae diris al mi, ke hieraŭ estis tre malvarme en la Jirisan kaj poste ŝi havis problemon. Ĉu ŝi varmumis? Ĉu ŝi malvarmumis?

..... Mi deziras, ke mia kara Jinsim faru bongustan doenjang supon por mi, sed ŝi ne emas

fari tion. Kion vi pensas, ĉu ŝi plenumos mian deziron iam?

..... Via amerika gasto ne scias, ĉu la koreaj kukaĵoj estas bongustaj aŭ malbongustaj. Pro tio li prenis peceton por gustumi. Mi ne komprenas, kion do li faris. Ĉu li manĝis nur malgrandan aŭ grandan parton de la kukaĵo, kiam li gustumis?

..... Ĉu mi bone pensas, ke ambaŭ kolumo kaj manumo estas partoj de ĉemizo? Ĉu kolumo estas proksime al la mano kaj manumo estas proksime al la kolo? Ĉu okazis iam, ke via edzo diris al vi memorindan penson? Kio estis tiu penso? Kiam li diris tion?

Ĉu okazis iam, ke via instruisto diris al vi memorindan penson? Kio estis tiu penso? Kiam li diris tion?

..... Kiom da butonoj estas sur via ĉemizo? Kiel instruis Jinsim esperanton en la busana arbaro? Ĉu en ĉemizo, aŭ ĉu sen ĉemizo? Kiam devis ŝi butonumi? Ĉu antaŭ la instruado? Ĉu post la instruado? Ĉu ambaŭ antaŭ kaj post la instruado?

..... Kiom da folioj estas en via Esperanto libro? Ĉu vi ĉiam bone uzas vian libertempon?

.....

Kion faris John, kiam li rigardis la libron de Jinsim dum la nokto? Ĉu li nur foliumis la Esperanto libron, aŭ ĉu li tralegis la tutan libron? Kial li faris tion? Ĉu jam okazis al vi iam, ke vi foliumis libron, sed poste ne legis ĝin? ...
..... Kial vi faris tion?
..... En Eŭropo familianoj kaj geamikoj ofte uzas amikecan nomon, kiam ili parolas unu kun la alia. Parolante pri viroj ili ne diras patro, sed diras paĉjo kaj ne diras onklo sed diras oĉjo. Parolante pri virinoj ili ne diras patrino, sed diras panjo kaj ne diras onklino, sed diras onjo. Ankaŭ en Koreio oni uzas malsamajn nomojn en la familio kaj inter amikoj? Kion vi faras, kiam vi devas lerni, sed ne povas, ĉar estas tre laca? Ĉu vi dormas anstataŭ lernado? Kion trinkas vi anstataŭ kafo, kiam vi volas trinki ĝin, sed ne estas kafo en via hejmo? Kion donas vi al via edzo post tagmanĝo, se li volas havi kelkajn pirojn, sed ne estas piroj en via ĝardeno?
Mi aŭdis, ke hieraŭ anstataŭ lernado vi ludis kun via amikino en la arbaro. Kio okazos nun en la lernejo?
..... Ĉu estas homoj en Koreio, kiuj povas ludi sen ludiloj? Ĉu eblas uzi sukeron anstataŭ mielo?

Mia gasto diras, ke la kafo ne estas sufiĉe dolĉa. La problemo estas, ke mi ne havas sukero kaj ne havas mielon hejme. Kion mi faru? Ĉu mi uzu salon anstataŭ sukero?

..... Soyeon laboras ie en la kamparo, sed mi apenaŭ vidas ŝin. Kial estas tiel? Ĉu, ĉar ŝi laboras tre proksime al mi? Kial estas, ke sesjaraj knaboj apenaŭ scias skribi kaj legi en Koreio?

..... Kial estas, ke koreoj apenaŭ povas paroli angle, kvankam ili devis lerni anglan lingvon dum kelkaj jaroj en la lernejoj?

..... Kial estas, ke Hanna tre bone povas legi, skribi kaj paroli esperante, kvankam ŝi komencis lerni tiun lingvon nur antaŭ kvar monatoj?

..... Ĉu vi volus edziniĝi al Gyeongnim anstataŭ Gyeongjae, se Gyeongjae ne volus edziĝi al vi? Ĉu koreoj frapas al la pordo, kiam ili vizitas amikojn? Aŭ ĉu ili kriadas antaŭ la pordo: “*Bonan tagon! Ni estas ĉi tie.*”?

..... Ĉu vi jam sentis en via familio, ke ili parolis al vi, kvazaŭ vi estus fremdulo?

..... Ĉu vi jam sentis, ke viro parolis al vi, kvazaŭ vi estus lia amikino?

..... Ĉu vi jam sentis en fremda lando, ke kvazaŭ vi estus hejme? Ĉu mi bone

pensas, ke bona amiko anstataŭ helpi ĉiam malhelpas?

..... Ĉu okazis iam en via lernejo,

ke alia instruisto anstataŭis vian instruiston?

..... Kial okazis tiu anstataŭado?

..... Ĉu jam okazis, ke vi vizitis

vian amikon kaj apenaŭ vi alvenis, poste vi tuj foriris?

..... Kial vi faris tion?

..... Hieraŭ mi diris al Jinsim,

ke ŝi venu al la Jirisan por vidi min. Ŝi respondis: “*Mi apenaŭ*

povos iri, ĉar mi laboros en Busan ĉiu tage.” Ĉu mi bone komp-

renas, ke tio signifas, ke ŝi baldaŭ aperos en la Jirisan?

..... Hieraŭ mi diris al

Hanna: “*Viaj hejmraskoj estas tre bonaj. Mi vidas, ke vi bone*

lernas kaj vi estas tre bonkora. Mi amas vin, kiel se vi estus mia

filino. Tio signifas, ke mi amas vin kvazaŭ vi estus mia filino.” Ŝi

aŭskultis min kaj poste diris al mi: “*Sed mi ne volas estiĝi via*

bofilino.” Ĉu ŝi bone komprenis, kion mi volis diri al ŝi?

..... Mi legas en la

libro, ke la ĉielo estas pura, kvazaŭ balaita. Ĉu mi bone komp-

renas, ke iu balais la ĉielon? Mi tute ne scias kie oni povus aĉeti

..... tian grandan balailon, per kiu oni povus balai la tutan ĉielon. ...

..... Vi havas tri librojn. La ruĝa

libro estas en la libroŝranko, ĉar vi komencos legi ĝin nur mor-

gaŭ. La bluan libron vi jam legis kaj post la fino de la lego vi me-

tis ĝin sur lablon. La verda libron vi nun legas, kaj pro tio ĝi es-

tas en viaj manoj. Kie estas la legita, la legata kaj la legota lib-

roj?

.....

Hajeong aspektas, kvazaŭ ŝi estus malsana. Ĉu tio signifas, ke ŝi estas malsana? Aŭ tio signifas, ke ŝi ne estas malsana, sed ŝi estas tre laca, ĉar dum la nokto ŝi multe lernis?

..... Ĉu vi jam estis ebria iam?

..... Ĉu vi jam vidis ebrian homon?

..... En la dek tria leciono estas ŝerco pri patro kaj filo. Kiu el ili estis ebria?

..... Kiel vidas, kiel iras kaj kiel parolas la ebriuloj?

..... Ĉu povas esti, ke malsanulo iras, kvazaŭ li estus ebria?

..... Ĉu vi ŝatas la homojn, kiuj parolas, kvazaŭ ili scius ĉion?

..... Ĉu ili vere scias ĉion, aŭ ili nur volas montri, ke ili scias ĉion?

..... Kion signifas la diro: “*Tiu homo aspektis, kvazaŭ li estus falinta el la luno.*”? Ĉu tio signifas, ke tiu homo vivas sur la tero kaj laboras, pensas kaj vivas, kiel ĉiuj aliaj homoj en sia ĉirkaŭaĵo?

..... Kiam vi koleriĝas? Ĉu kiam via amiko parolas al vi amikece kaj karesas vin?

..... Kio kolerigas vin?

..... Matene via amiko parolis al vi malbone kaj malamikece kaj li diris al vi malveron. Kiom

longe vi havos koleron? Kiam oni semas en Koreio kaj kiam oni rikoltas?
 Eŭropa proverbo diras: “*Falinta floro ne revenos al la branĉo.*” Ĉu tio signifas, ke mortinta homo neniam reviviĝos? Kia estas leginda libro?
 Kiam vi lastfoje malvarmumis?
 Kio estas kolumo kaj manumo?
 Ĉu vi havas nun kaprojn kaj ŝafojn en via ĝardeno? Kial ne? Ĉu vi ne scias ke la kaproj kaj la ŝafoj estas tre amikecaj?
 Kio donas lakton al la homoj: la kaprinoj aŭ la kapridoj? Kiel vidas ebria homo: duoble, aŭ duone?
 Ĉu vi havas koloron, kiam ebria homo diras al vi, ke vi estas malbela? Kiom da kapridoj vivis en la fabelo de la Esperanto libro?
 Ĉu vi havas fabelojn pri kapridoj en Koreio?
 Kie estis la herbejo kaj kie vivis la kapridoj?
 Ĉu ili vivis sole en la dometo? Kion faris ilia patrino? Kial iris ŝi al la urbo? Per kio manĝigis la kaprino la kapridojn? Kie lasis

ŝi la kapridojn, kiam ŝi foriris?
 Ĉu ŝi diris al la kapridoj, ke ili enlasu la lupon?
 Ĉu vi timus, se vi renkontus lupon en la
 arbaro? Kial diris la kaprino,
 ke la kapridoj ne enlasu la lupon? Kion volis fari la lupo?
 Kiel oni povas ekkoni
 la lupon? Ĉu vi povas
 ekkoni, kiu estas la lupo, se aperas lupo kaj hundo antaŭ vi en
 malhela arbaro? Kian koloron
 havas la piedoj de la lupo kaj kian voĉon li havas?
 Kion diris la lupo,
 kiam li volis eniri la dometon unue?
 Ĉu la kapridoj kredis, ke la lupo estis
 sia patrino? Kial ne kredis ili tion?
 Kion faris poste la
 lupo? Kion faris la
 forĝisto?
 Kion diris li, kiam li reiris al la dometo de la kapidroj?
 Kial li reiris tien denove?

 Kial ne kredis la kapidroj denove, ke li estis sia patrino?
 Kion faris la lupo
 poste? Ĉu li flavigis siajn piedojn kaj ruĝigis sian buŝon?

Kion faris la lupo per la faruno kaj kion faras Gyeongsim per la faruno? Kion diris la lupo, kiam li denove reiris al la kapra dometo?
..... Kion faris nun la kapidroj? Kial faris ili tion?
..... Kion faris poste la lupo?
..... Ĉu li manĝis ĉiujn kapidrojn? Kial ne povis li manĝi la sepan kapidron?
Kion vidis la kaprino, kiam ŝi hejmeniris? Kiu respondis, kiam ŝi vokis siajn kapidrojn? Kia ŝi estis tiam? Ĉu gaja? Ĉu malgaja? Kiu rakontis al la kaprino, kio okazis, dum ŝi ne estis hejme?
..... Kion faris la lupo tiam? Ĉu mi bone rememoras, ke li legis gazeton en la ĝardeno?
..... Kion faris poste la kaprino? Ĉu ŝi tranĉis la piedojn de la lupo? Kion faris la kapridoj, post kiam sia patrino tranĉis la ventron de la lupo?
..... Ĉu ili estis

vivantaj aŭ mortintaj? Per
kio plenigis ili la ventron de la lupo?
Per kio plenigas vi vian ventron, kiam vi estas malsata?
..... Kion faris poste la lupo? Ĉu
mi bone rememoras, ke li iris al la maro?
..... Kial li iris al la rivero?
..... Kial dancis kaj kantis
la kapidroj poste?
Ĉu reiros la lupo iam al la dometo de la kapra familio?
..... Kiel volis kredigi la
lupo, ke li estas la patrino de la kapridoj?
.....
Ĉu birdoj manĝas hundojn aŭ hundoj manĝas birdojn?
..... Ĉu estas birdoj en Koreio, kiuj
manĝas fiŝojn?
Ĉu estas birdoj en Koreio, kiuj manĝas pli malgrandajn birdojn?
..... Kiom da
fiŝoj havas viaj gepatroj en ilia ĝardeno?
..... Ĉu azeno aŭ ĉevalo
estas pli granda?
Ĉu vi ŝatis kokidojn kiam vi estis juna?
..... Ĉu ĉiuj aziaj infanoj ŝatas
ludi unu kun la alia?
Kio estas pli bongusta: ĉu pano aŭ rizo?

Kie renkontiĝis Jinsim kaj John? Ili renkontiĝis en Jagalchi.
..... Ne. Jagalchi ne estas en Incheon. Ĝi estas en Busan.
Ambaŭ li kaj ŝi promenis en stratoj de Jagalchi.
..... Eble Jinsim iris aĉeti fiŝon kaj fruktojn kaj mi pensas, ke John volis rigardi la plej grandajn fishvendejojn de Azio.
..... Ne, vi malbone scias. Tio ne estis ĉe la rivero, sed ĝi estis ĉe la maro.
..... Li diris al Jinsim, ke “*Vi estas tre bela.*” kaj demandis: “*Kion vi faras?*”.
..... Kompreneble ŝi ĝojis, ke John diris tion al ŝi.
Poste ili iris por vespermanĝi.
Ili faris tion, ĉar John volis paroli kun Jinsim pri la esperanto lingvo. Mi scias, ke Jinsim tre ŝatas la fiŝaĵojn, sed povas esti, ke John interesiĝis pri pulgokio. Eble ili manĝis pulgokion pro tio.
..... Ili faris tion, ĉar John volis rigardi kaj enmanigi ŝian Esperanto libron, sed Jinsim ne havis tiun libron kun ŝi en la restoracio.
..... Ili tralegis la libron dum la nokto,

ĉar estis interesaj ŝercoj kaj anekdotoj en la libro. Eble John tre
interesiĝis pri ŝercoj kaj anekdotoj.
..... Mi scias, ke kelkaj
koreoj pensas tiel, sed mi diras, ke ili ne estis en la hejmo de
Jinsim dum tiu nokto. Do ili tute ne scias, kio okazis kaj kio ne
okazis en tiu loĝejo dum tiu nokto.
..... Ne. Poste ili iris ne nur al
la arbaro, sed ili iris ankaŭ en la arbaron.
..... Ili iris tien, ĉar John petis, ke
Jinsim instruu esperanton al li en la naturo.
..... Ili ne timis pri tio, ĉar
estis multaj vojmontriloj en la arbaro.
..... Ankaŭ pri tio ili ne timis, ĉar ili sciis, ke
en tiu parto de la arbaro ne estis lupoj kaj aliaj timigaj bestoj. ...
..... Li tre rapide lernis
kiel nomiĝas la arboj kaj la floroj.
..... Ĉar esperanto estas facile
lernebla simpla lingvo.
..... Li petis, ke Jinsim senvestiĝu, ĉar poste
li volis lerni kiel nomiĝas la diversaj partoj de la homa korpo. ...
.....
Tio tute ne estis problemo. Se la butonoj estis sur la dorsa parto
de ŝia vestaĵo, tiam John povis helpi butonumi.
..... Tio estas vero. Eble li

lernis la partojn de la homa korpo tre malrapide, ĉar estas tre multaj korpopartoj sur la korpo.
 Li ne bezonis lerni tion en la arbaro, ĉar tiun korpoparton de Jinsim li jam povis vidi antaŭe ankaŭ en Jagalchi. Ĉar oni ne havas vestaĵon ĉirkaŭ sia vizaĝo. Li tute ne kisis ŝin tiam. Mi scias, ke li ne faris tion, ĉar Jinsim tute ne parolis al mi pri tiu okazaĵo.
 Vespere ambaŭ John kaj Jinsim estis feliĉaj.
 Jinsim estis feliĉa, ĉar ŝi povis multe instrui kaj John estis feliĉa, ĉar li multe lernis dum tiu tago.
 Eble ili iris vespermanĝi post la lernado, ĉar ili lernis dum la tuta tago. Kaj mi pensas, ke dum tia longa tempo ili malsatiĝis. Sed Jinsim ne parolis al mi pri tio. Do, ankaŭ povas esti, ke ili simple hejmeniris post la longa instruado kaj lernado.
 Vi malbone pensas. John ne diris al Jinsim, ke li volis edziĝi al ŝi.
 Mi bone scias, ke John ne faris tion, ĉar Jinsim ne parolis pri tio al mi.
 Tiam John ne petis, ke Jinsim iru al Ameriko por instrui esperanton. Tio okazis nur post kelkaj monatoj.
 Nun mi ne scias kie vivas kaj kion faras John en Ameriko.

La venonta skribaĵo aperis en la libro “戒杀护生故事集” (Amo al la vivoj) de T. B. Talovich kaj Miaohui. Traduku ĝin!

“La dekdua parto de la *Saĝo-malsaĝo-Sutro (Damamuka-nidana)* rakontas, ke monaĥo meditadis en arbaro, kiam nia Budho Ŝakjamunio estis en Ŝravastio. Tie li ne nur meditadis, sed ankaŭ rediradis sutrojn. Lia voĉo estis tre bela kaj pro tio ankaŭ birdoj kaj aliaj bestoj ŝatis aŭskulti, kiam li paroladis.

Malgranda birdo precipe ŝatis aŭskulti lian voĉon, kiam li rediradis sutrojn. Kiam ajn la bonzo faris tion, ĝi ĉiam sidis sur proksima branĉo de arbo kaj aŭskultis.

En iu tago, kiam la birdeto ĝoje aŭskultis la sutron, tiam ĉasisto pafis ĝin. Post la morto ĝi iris en la ĉielon kaj renaskiĝis kiel ĉielulo pro la merito de aŭskultado de sutroj. La ĉielulo havis povon rememori sian antaŭan vivon. Kiam li eksciis kaj komprenis kial li renaskiĝis en la ĉielo, tiam li kolektis ĉielajn florojn kaj portis ilin al la monaĥo, kiu rediradis la sutrojn en la arbaro. Poste li diris al la monaĥo, ke li elkore dankas pro la ebleco, ke li, kiel birdeto, povis antaŭe aŭskulti la belajn sutrojn.

La monaĥo ne komprenis, kiel povas esti, ke ĉielulo dankas ion al li, simpla mortulo. Kiam li trovis, ke tiu ĉielulo estis la iama birdeto, kiu kun ĝojo aŭskultis lin, tiam li estiĝis feliĉa. Kaj li donis la plej bonan donacon al sia aŭskultanto: la donacon de saĝo. Li instruis la ĉielulon pri la vero de la mondo, do pri tio, kio nomiĝas Budha Darma.

La ĉielulo ĝojegis pro tia bona donaco. Pro la nova saĝo, li progresis rapide kaj reiris al la ĉielo por daŭrigi sian lernadon.”

Mi vidas, ke Gyeongsim jam povas fari bonan panon kaj povas kuiri bongustan doenjang supon. Ĉu tio signifas, ke ŝi jam estas preta edziniĝi?

Estas diro: “*La ĉinoj manĝas ĉion, kio moviĝas sur la tero, se tio ne estas aŭto. Kaj ili manĝas ĉion, kio naĝas en la akvo, se tio ne estas ŝipo. Kaj ili manĝas ĉion, kio flugas en la aero, se tio ne estas flugmaŝino.*” Ĉu mi bone komprenas, ke tio signifas, ke la ĉinoj ne manĝas viandon?

..... Ĉu vi jam ĵetis pilkon sur la barilon?

..... Ĉu vi iras preter via fenestro aŭ super via fenestro?

Ĉu mi bone komprenas, ke stratoj estas ekster la urbo kaj kampoj estas en la urbo?

..... Laŭ mia seoula amiko Jinsim ne vere amis min. Ĉu ankaŭ laŭ vi?

Hanna diras, ke ŝi ĵus vidis, ke Gyeongŝim laboris en la ĝardeno. Ĉu mi bone pensas, ke Gyeongsim nun rigardas televidilon en ŝia ĉambro?

Kiom da bordoj havas rivero?

Ĉu bona aŭ malbona infano batas sian patrinon?

..... Ĉu naskiĝtago de Budho estas festotago en Koreio? Ĉu ankaŭ la kristonasko?

..... Ĉu vi permesas, ke mi prezenetu min al vi?

..... Ĉu mi bone pensas, ke

sinjoro Ban Ki Mun estas la edzino de Ban Ki Mun?

 Kiu estas la edzo de sinjoro Tanaka?
 Ĉu vi ŝatas vespermaĝi frue aŭ malfrue?
 Kio estas pli laŭta besto: hundo aŭ fiŝo?
 Ĉu la naŭa horo matene estas
 tro malfrua por komenci labori?
 Ĉu ni tagmanĝu precize je la dekdua horo aŭ proksimume je la
 tagmezo? Ĉu Koreio
 estas la lando de la leviĝanta suno?
 Sur kiu etaĝo estas via loĝejo?
 Ĉu la necesejo estas apud la
 lavejo? Ĉu necesas viziti
 necesejon ĉiutage? Kiel vi
 promenas en arbaro nokte? Ĉu atente aŭ malatente?
 Ĉu koreoj fumas en lernejoj?
 Kiam vi manĝas glaciaĵon: dum vintro aŭ
 dum somero? Ĉu riĉeco gravis
 kiam vi elektis edzon? Kio gravis tiam?
 Ĉu tramo aŭ trajno estas pli rapida?
 Mia amiko diris: "*Bonvolu doni
 al mi akvon!*" Ĉu li volas ricevi manĝaĵon?
 Kio estas la plej gravaj vestaĵoj?

“En la mezepoko reĝo havis sekretan amantinon kaj tiu virino tre plaĉis al li. Pro tio li volis donaci valorajn al sia amantino. Do li ŝtelis valorajn orajn braceletojn de la reĝino kaj sekrete li donacis ilin al la amantino. La reĝo pensis, ke la reĝino havis tro multajn valoraĵojn kaj pro tio ŝi ne rimarkos, ke siaj braceletoj malaperis.

Post kelkaj semajnoj teatra grupo alvenis al la urbo. La teatra programo ŝajnis esti interesa kaj ĝin ankaŭ la reĝo ĉeestis kun la reĝino en speciala loĝio kune kun multaj civitanoj de la urbo. Ankaŭ la amantino ĉeestis en alia loĝio kune kun siaj geamikoj.

La amantino estis tro fanfaronula persono kaj ŝi volis montri al la publiko, ke ŝi havis tre belajn kaj valorajn orajn braceletojn. Pro tio dum la tuta teatra prezentado ŝi konservis siajn manojn en speciala pozicio por ke ĉiuj homoj vidu siajn valoraĵojn.

Post la unua parto de la teatra programo okazis paŭzo. Dum la paŭzo nekonata homo iris al la loĝio de la amantino, kiu havis uniformon de reĝaj korpogardistoj. Li dece salutis ŝin kaj diris, ke la reĝino interesiĝis pri la valoraj braceletoj, kiujn ŝi havis. Samtempe li petis, ke la virino donu al li unu el la valoraĵoj por montri ĝin al la reĝino.

La virino kun ĝojo aŭdis tiun novaĵon kaj ŝi donis unu el la braceletoj al la korpogardisto. Sekrete ŝi esperis, ke la reĝino invitos ŝin al la reĝa kortego por amike babiladi kaj tiel ŝi havos ŝancon aperi en la alta socio de aristokratoj. Ŝi ne volis resti nur sekreta amantino de la reĝo sed ŝi sopiris aperi ankaŭ en kompanio de altrangaj eminentuloj.

Poste la teatra programo daŭriĝis kaj okazis la dua paŭzo. Dum la dua paŭzo alia homo iris al la loĝio de la amantino. Li havis nenian uniformon, tamen li anoncis, ke li estis la estro de la urba policoficejo. Li raportis, ke antaŭ minutoj policistoj arestis homon, kiu havis similan braceleton, kiun la virino havis. Post mallonga demandado la homo konfesis, ke li ŝtelis la braceleton de nekonata virino en la teatro. Pro tio la policisto petis, ke la virino donu al li la duan braceleton por ke ili povu kompari la braceletojn. Do, la virino donis la duan braceleton al la homo, kaj tiu ĉi homo tuj foriris...

Tio estas la unua parto de amuza historio, sed estas demando: Ĉu kio povas esti la fino? Provu fini la historion laŭ viaj pensoj!

인드라망대학 - 마르쿠스 가보르박사의 에스페란토 강의 (22-4)

다음은 T.B. Talovich 와 Miaohui의 “戒□□生故事集” (Amo al la vivoj) 라는 책에 나오는 내용이다. 번역하세요.

지혜-어리석음 경전의 12번째 부분에 우리의 석가모니불이 Śravastio에 계실 때, 한 스님이 숲에서 명상을 하고 있었다고 한다. 거기서 그는 명상을 했을 뿐만 아니라 염불을 했다. 그의 목소리가 매우 아름다워서 그가 말할 때, 새들과 다른 짐승들이 듣는 것을 좋아했다. 그가 염불을 할 때, 작은 새가 특히 그의 목소리를 듣는 것을 좋아했다. 그 스님이 그것을 할 때마다, 그 작은 새는 가까운 나뭇가지에 앉아서 들었다.

그 작은 새가 그 경전을 기쁘게 듣고 있던 어느 날, 사냥꾼이 그 새를 쏘았다. 죽어서 그 새는 하늘로 가서 경전을 잘 들은 덕택에 천인으로 환생했다. 그 천인은 전생을 기억하는 능력을 지녔다. 그가 왜 하늘에서 다시 태어났는지를 알고 이해했을 때, 그는 천상의 꽃을 모아 숲에서 염불을 하고 있던 스님에게 가져다 드렸다. 나중에 그는 스님에게, 작은 새로서 그가 예전에 아름다운 염불을 들을 수 있었던 것에 대해 진심으로 감사한다고 말했다.

스님은 천인이 단순한 사람인 그에게 뭐가 감사하다고 할 수 있는지 이해 할 수 없었다. 그 천인이 기쁘게 그가 염불하는 소리를 들었던 작은 새였다는 것을 알았을 때, 그는 행복해 졌다. 그는 그 청자에게 가장 좋은 선물인 지혜를 선물로 주었다. 그는 천인에게 부처의 가르침이라 말하는 세상의 진리에 대해 가르쳤다.

천인은 그러한 좋은 선물에 대해 매우 기뻐했다. 그 새로운 지혜 덕분에, 그는 빠르게 진급했고 그 수행을 계속하기 위해 하늘로 돌아갔다.



POSTPAROLO

D-ro Márkus Gábor, la aŭtoro de tiu ĉi libro, estas jam fame konata kiel la verkinto de "Ruĝa suno kaj verda stelo" pri siaj universitataj jaroj en Japanio kaj "Trans la flava maro". Estas al mi granda honoro skribi la mesaĝon gratulan kaj rekomendan por lia nova verko.

Kiel konate, la lingvoinstruado konsistas el aŭdi, legi, paroli kaj skribi. El la kvar elementoj 'paroli' estas la plej grava kaj urĝa afero en la instruado de lingvo, ĉar ni devas unue 'paroli' por komuniki nian opinion al homoj, kiujn ni renkontas.

Do, ni devas instrui ne nur la vortojn, gramatikojn kaj esprimojn, sed ankaŭ ni bezonas prezenti diversajn temojn - t.e. interesaj rakontoj, ŝercoj kaj aktualaĵoj, ktp. - per kiuj oni povas interparoli kun abunda temo.

La aŭtoro de tiu ĉi libro multe klopodis por solvi tian problemon. Li evitis la 'monotonajn tekstojn' kaj enkondukis 'centro-eŭropajn kabaredojn kaj humuraĵojn' de la lasta jarcento por stimuli kaj paroligi la lernantojn. Do, mi ne dubas, ke liaj lernantoj sukcese lernas Esperanton, eĉ ĝuante la enhavoriĉan konversacion.

Precipe interesas min la hungaraj ŝercoj kaj humuraĵoj, ĉar mi jam spertis amuziĝi per ili, kiam mi vizitis Hungarion en la jaro 1983 kaj aŭdis de la karmemora d-ro Otto Haszpra la hungarajn humuraĵojn: 'serio de stulta policano'.

Mi jam ekhavas grandan scivolemon pri la nova libro de mia amiko Gábor, kaj esperas, ke tiu libro gvidos koreajn esperantistojn al pli vigla lernado, ekzercado kaj praktikado de Esperanto.

Mi kore dankas al la aŭtoro pro lia sindona instruado de Esperanto, kaj esperas, ke li plene rikoltos abundan sukceson kun la nova verko, ĝuante sian esperantistan vivon en Koreio.

Amike,

MA Youngtae
Akademiano de Esperanto
Docento de Esperanto en Dankook Universitato



„ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO”

La membroj de la libroserio de Dr. Markus Gabor:

- Ruĝa Suno kaj Verda Stelo
- 赤い太陽と緑の星
- Vörös Nap és Zöld Csillag
- 황해를 넘어서
- Trans la Flava maro
- Sudorientaziaj vojaĝoj
- Délkelet-ázsiai utazások
- 东南亚之旅
- A Sárga tengeren túl
- Tavasz a Szentföldön
- A kenguruk földjén
- 인드라마대학 - 에스페란토 강의 (1 부)
- 인드라마대학 - 에스페란토 강의 (2 부)

이 책의 저자인 마르쿠스 가보르 박사는, 대학시절의 이야기를 담은 ‘붉은 태양과 녹성기(錄星旗)’, ‘황해를 넘어’라는 두 권의 책으로 이미 이름을 떨치고 있다. 그런 유명인의 새 저서를 위해 축사와 추천의 글을 쓰다는 것은 나에게 큰 영광이다.

알려진 바와 같이, 언어 교육이라는 것은 듣기, 읽기, 말하기, 쓰기 등으로 구성된다. 이런 네 가지의 요소들 중에서 ‘말하기’는 언어 교육에 있어 가장 중요하고 우선시된다. 왜냐하면 우리는 우리가 만나는 사람들에게 맨 먼저 우리의 의사를 전달하기 위해 말을 해야 하기 때문이다.

따라서 우리는 단어, 문법, 표현 이런 것들만 가르칠 뿐만 아니라 다양한 표현들, 즉 재밌는 이야기, 유머, 시사문제 등도 소개할 필요가 있으며 그런 사항들을 가지고 우리는 풍부한 주제로 대화를 할 수 있는 것이다.

이 책의 저자는 그런 문제를 해결하기 위하여 많은 노력을 기울였다. 그는 ‘단조로운 텍스트’만 소개하는 것을 지양하고, 지난 한 세기 동안의 ‘중앙 유럽의 문예(文藝)와 유머’들을 도입하여 학생들을 고무(鼓舞)하고 말을 하게 하였다. 그래서 나는, 그의 학생들이 풍부한 내용의 대화를 즐기면서 에스페란토를 배울 것이라는 것을 믿어 의심치 않는다.

특히 헝가리의 농담과 유머가 나의 흥미를 끌었다. 왜냐하면 1983년 내가 헝가리를 방문했을 때 고(故) 오토 하스프라 박사한테서 ‘멍청한 경찰관 시리즈’라고 하는 헝가리 유머를 이미 재미있게 들었던 경험이 있기 때문이다.

나는, 나의 친구 가보르의 새로운 책에 관하여 큰 호기심이 생겼으며, 그 책이 한국의 에토인들이 더욱 활기차게 에스페란토를 배우고 연습하고 활용하도록 지도해 주기를 희망한다.

나는 저자가 헌신적으로 에스페란토를 교육하는 것에 대해 진심으로 감사드린다. 새 저서로써 큰 성공을 거두기를 희망하며 한국에 거주하면서 에토인의 생활을 즐기시기를 바란다.



9789635714810

ISBN 978-963-571-481-0



친구로부터,

마 영 태

세계에스페란토학술원 회원
단국대학교 에스페란토 강사